

*La infanoj kutimis babili, antaŭ ol ili enlitiĝis. Ili sidiĝis sur la larĝa forno kaj rakontis, kio ajn venis en ilian kapon. Tra la malklaraj fenestroj rigardis en la ĉambron la vespera krepusko per okuloj plenaj de sonĝoj, el ĉiuj anguloj leviĝis supren silentaj ombroj kaj kunportis mirindajn fabelojn. **Uzino 7***



UZINO 7

Legolibro kun originala

kaj tradukita beletro

Redaktis Franko Luin

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-205-0

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

JUNIO 2003

Enhavo

Pri Uzino	4
Infanoj kaj olduloj (<i>Ivan Cankar</i>)	5
Ĉu ekzistas anĝeloj? (6) (<i>John Einar Åberg</i>)	10
La tri malaltaj mesoj (<i>Alphonse Daudet</i>)	27
La ĝibulo (<i>Gertrud Lilja</i>)	40
Katarino kaj Katjo (<i>Ferenc Herczeg</i>)	49
La fontano de juneco (<i>Nathaniel Hawthorne</i>)	58
La knabineto kaj la karbo (<i>Ferenc Szilágyi</i>)	73
La maljuna pomarbo (<i>Miško Kranjec</i>)	82
La aglino (<i>Fredrika Bremer</i>)	91
La kverka visko (<i>Hégésippe Moreau</i>)	95

Pri Uzino

Uzino estas legolibro kun variaj prozaj beletraj tekstoj, originalaj kaj tradukitaj. Kiel oni povas diveni el la nomo, ofte povas temi pri tekstoj daŭre prilaborataj, ĉapitroj el tradukataj romanoj, unuopaj noveloj, pli-malpli pretaj skizoj. Iujn oni povas trovi en alia formo en la interreto, aliaj aperas ĉi tie por la unua fojo. Ankaŭ tekstoj jam aperintaj en disaj gazetoj, sed malmulte konataj, povas trovi lokon en Uzino.

Ĉiu Uzino estos minimume 100-paĝa. Aŭtoroj, kiuj havas ion publikigindan povas sendi sian verk(er)on al uzino@omnibus.se.

Oni povas uzi ĉi tiun interretan medion por vekti la intereson de la legontoj, prezentante rakonton, novelon aŭ ĉapitron el originala aŭ tradukata romano, kies publikigo kuŝas en la fora estonteco.

Franko Luin

Infanoj kaj olduloj

La infanoj kutimis babili, antaŭ ol ili enlitiĝis. Ili sidiĝis sur la larĝa forno kaj rakontis, kio ajn venis en ilian kapon. Tra la malklaraj fenestroj rigardis en la ĉambron la vespera krepusko per okuloj plenaj da sonĝoj, el ĉiuj anguloj leviĝis supren silentaj ombroj kaj kunportis mirindajn fabelojn.

Ili rakontis, kio ajn venis en ilian kapon, sed en la kapon venis nur belaj rakontoj, kunplektitaj el suno kaj varmo, el amo kaj espero. La tuta estonteco estis unu sola longa kaj hela festotago; inter kristnasko kaj pasko ne estis cindra merkredo. Ie tie malantaŭ bunta kovrilo la tuta vivo treme kaj flagre fluas el lumo en lumon. La vortoj estis duonkompreneblaj flustroj; neniuj rakonto havis komencon nek klaran aspekton, neniuj fabeloj finon; kelkfoje ĉiuj kvar infanoj parolis samtempe kaj neniuj ĝenis la alian; ĉiuj rigardis ekstaze en tiun belegan ĉiellumon, kaj tie estis laŭta kaj vera ĉiu vorto, ĉiu rakonto havis vivan kaj helan aspekton, ĉiu fabelo mirindan finon.

La infanoj tiel similis unu la alian, ke en la krepusko ne rimarkeblis diferenco inter la vizaĝo de la plej juna, la kvarjara Tonĉjo, kaj la vizaĝo de la dekjara Lonjo, la plej aĝa el ili. Ili ĉiuj havis malgrasajn vangojn kaj grandajn, plene malfermitajn okulojn, revantaj internen kaj en la malproksimon.

Tiun vesperon io nekonata, el fremdaj lokoj, perforte enmiksitis sin en la ĉielan lumon, batis senkompatate en festotagojn, rakontojn kaj fabelojn. Poŝtaĵo informis, ke la patro "falas" en Italio. "Li falas." Io nekonata, nova, fremda, tute nekomprenebla venis antaŭ ilin, staris tie alte kaj larĝe, sed havis nek vizaĝon, nek okulojn, nek buŝon. Ĝi ne apartenis al io; ne al la laŭta vivo antaŭ la preĝejo kaj la strato, ne al la varma krepusko sur la forno, ankaŭ ne al la fabeloj. Ne estis io gaja, sed ankaŭ ne io speciale malgaja; ĉar ĝi estis senviva, ĝi nek havis okulojn, tiel ke ĝi povus per rigardo malkovri kial kaj de kie, nek buŝon, tiel ke ĝi per vortoj rakontus. La penso staris kompatinda kaj timema antaŭ tiu grandega fantomo, kiel antaŭ grandega nigra muro, kaj ne povis iri ien. Ĝi proksimiĝis al la muro, tie ekgapis kaj silentiĝis.

"Kiam li nun revenos?" penseme demandis Tonĉjo.

Lonjo rapide rigardis lin kolere:

"Kiel li revenu, se li falas?"

Ĉiuj silentis, ĉiuj kvar staris antaŭ la grandega nigra muro kaj ne vidis trans ĝin.

”Ankaŭ mi iros al milito!” subite aŭdigis sin la sepjara Mateo, kiel se li rapidmane kaptus veran penson kaj ĉion, kio estis direnda.

”Vi estas tro malgranda!” per profunda voĉo admonis lin Tonĉjo, kvarjara, kiu ankoraŭ uzis jupeton.

Milka, la plej malgranda kaj malsaneta el ĉiuj, volvita en trograndan patrinan tukon, tiel ke ŝi similis al vojaĝfasko, petis per silenta, mola voĉeto, kiel de ie sub ombro:

”Kia estas milito, tion rakontu, Mateo . . . rakonton diru!”

Mateo klarigis:

”Milito estas tia, ke homoj buĉas unu la alian per tranĉiloj, hakas per sabroj kaj pafas per pafiloj. Ju pli da ili oni buĉas kaj dishakas, des pli bone, neniu ion diras; ĉar tiel devas esti. Tio estas milito.”

”Sed kial ili buĉas kaj dishakas unu la alian?” demandis Milka, la kompatindulino.

”Por la imperiestro!” diris Mateo kaj ili eksilentis. En la malproksimo aperis antaŭ iliaj fermitaj okuloj io grandioza, lumigita de brila aŭreolo. Ili ne moviĝis, la spiro apenaŭ kuraĝis eliri el la buŝo; kiel en preĝejo dum la granda beno.

Poste Mateo denove eksvingis la rapidan manon kaj kaptis sian penson, eble nur pro tio, ke li flankenmovu la silenton, kiu kuŝis malhele super ili.

”Ankaŭ mi iros al milito . . . mi iros kontraŭ la malamikon!”

”Kia estas la malamiko . . . ĉu li havas kornojn?” subite demandis la febla voĉeto de Milka.

”Kompreneble li havas . . . kiel li cetere estus malamiko?” serioze kaj preskaŭ kolere certigis Tonĉjo.

Ankaŭ Mateo mem ne konis la ĝustan respondon.

”Mi kredas, ke li ne havas!” li diris malrapide, sed la vorto haltiĝis survoje.

”Kiel li havu kornojn . . . li estas homo kiel ni!” aŭdigis sin nevole Lonjo; poste ŝi iom pripensis kaj aldonis: ”Sed animon li ne havas!”

Post longa pripensado Tonĉjo demandis:

”Kiel estas, se homo falas en milito . . . tiel surdorsen?” Li montris, kiel homo falas surdorsen.

”Oni mortigas lin . . . ĝismorte!” trankvile klarigis Mateo.

”Patro promesis, ke li kunportos al mi pafilon!”

”Kiel li kunportu, se li falis!” abrupte riproĉis lin Lonjo.

”Kaj ĉu oni mortigis lin . . . ĝismorte?”

”Ĝismorte!”

Ok junaj, plene malfermita okuloj silente kaj timeme gapis en la krepuskon . . . gapis en ion nekompreneblan.

Ĝuste tiam la geavoj sidis sur benko antaŭ la domo. La lasta vespera lumo brilis malantaŭ la malhela foliaro en

la ĝardeno. Estis silenta vespero; nur el la stalo aŭdiĝis longa, jam raŭka ploro; verŝajne la juna patrino, irinta manĝigi la brutaron.

La du geolduloj sidis profunde klinitaj, dense unu apud la alia kaj tenis la manojn, kiel jam delonge ne; ili rigardis en la vesperan ĉielruĝon per senlarmaj okuloj kaj diris eĉ ne vorton. —

Ivan Cankar

El la slovena tradukis Franko Luin

Ĉu ekzistas anĝeloj? (6)

Bedaŭrinde pli da prezentado kaj krome mallonga vizito al la socia supro

La posta tago ne estis malpli okazoriĉa. Ĝi komenciĝis per mirinda mateno, opiniis Hagson. Kantis ene de li survoje al la laboro, li leviĝis libere en la aŭtobuso kaj lasis sidlokon al delonge graveda virino, li elsaltis kelkajn haltejojn pli frue por promeni tra la havenparko kaj ĝui ĝian verdon. Ne restis iu doloro en la kruroj post la hieraŭa laciga promenado. Se li sentis ion, tio limiĝis al laceco de la lango kaj maltrankvilo en la stomakregiono, eble li devos kaŭriĝi. Sed ankoraŭ ne urĝis.

La tutan tempon pluvis kvazaŭ per siteloj; li ne rimarkis tion. Li ĝuis la nove lavitan verdon, la kolombojn, kiuj ekzercis rondflugadon en perlbrilaj aroj super la kanalo en strikta formacio; nekonscie li imitis la geston de unu el la plej konataj statuoj de la urbo, gesto, kiun

la kolomboj komprenas en sia maniero. Tamen neniu observis tion.

Eble estis pli bone tiel.

Li estis surprizita, ke nur li ĝojas pri la raveco de la mateno, ĉiuj aliaj kuregis, tuj kiam ili venis sur la straton, kaj li aŭdis multajn blasfemojn pri la pluvo, kiu aperis ĝuste kiam la homoj devis iri laborejen. Li malfacile komprenis tion.

—Ĉielo, kiel malseka vi estas, diris Unua, kiam li enŝmatis. Ĉu vi banis vin kun vestaĵoj?

—Hodiaŭ mi sola ĝuis la belecon de la naturo, Hagson klarigis emfaze. Li volis pludonaci iom da sia interna ĝojo.

—Kisu min!

Ne estis malbone intencite, sed tio reestablis kontakton inter Hagson kaj la realo. Li bedaŭris ĉiujn, kiuj ne sentas same kiel vi, sed tio estis ilia afero.

—Kio nova, li demandis senĝene, alio ol ke pluvas iomete?

Unua deziris diri ion.

—Mi aŭdis en la urbo hieraŭ de absolute findinda fonto, ke Huss ricevos dek ses.

—Kion vi diras? ekkriis Hagson. Neeble!

—Eble, diris Clemens amare, ĉio estas ebla.

—Vidu, vidu, tiel estas. Lans skuis la kapon, li ne volis diri, de kiu li aŭdis tion, sed devenis de fonto proksima al Stenman.

—Pri Stenman, li aldonis, li telefonis al mi hieraŭ kaj demandis, kia estas Froman. Kion vi opinias?

Hagson havis respondon ĉemane. Unua diris pri ĉiu junulo, ke li estas ĝentila kaj afabla. Pri la junularo li diris, ke ĝi estas terura.

—Li estas ĝentila kaj afabla! Hagson diris rapide. Unua kontente ridetis.

—Ekzakte tio, kion mi diris al Stenman. Stenman ankaŭ demandis, ĉu li estas aroganta, sed tiam mi diris, tute ne, li ne estas pli aroganta ol la nuntempa junularo. Hm, diris Stenman, mi observas lin konstante.

Fraŭlino Günter ne similis sin mem ĉi matene. La haŭto estis pala, la okuloj aspektis kiel du fendetoj kaj la irado estis iaspeca tangotranco. Ŝi eĉ ne havis tempon por ŝminki sin. Neniam ŝi tiel malfavore montris sian belan flankon.

Nun aŭ neniam, pensis Hagson.

—Bonan matenon, fraŭlino Günter, li diris en sia plej bonmaniera tono kaj klinis sin profunde, mi kredas, ke hodiaŭ fraŭlino Günter estas pli bela ol iam.

Li neniam kredis, ke ŝi subite haltos, ruĝiĝos kaj surmetos mirinde belan rideton, profunde kliniĝos kaj nature kaj ĝentile diros:

—Koran dankon, sinjoro Hagson, tiel belega komplimento!

Ŝi ensorĉis lin per sia spontanea ĝojo, li sekigis larmon en la okulo kaj pensis: Vidu, vidu, oni ĉion kapablas!

Ŝi ricevis dumvivan amikon en li.

Lia ĝentileco estis sukcesa kaj li daŭrigis aŭtomate, ĝis kiam li rimarkis, ke oni ne povas kondukti bonmaniere kiom ajn longe, ekzistas limoj ankaŭ por tio. Tion li rimarkis tre baldaŭ.

Lia kvara aŭ kvina viktimo estis fraŭlino Logren el kambiokontantigo, ĝisosta virgulino ek de la naskiĝo. Larĝa, komanda kaj kolerema, ŝi venis laŭlarĝe kiel ŝarĝaŭto, pli terure ol kambia protesto, hororo de ĉiuj rajdantoj de la apokalipso.

Tute strange ŝi akceptis lian "Bonan matenon, belulino" kaj respondis ĉiam ĝentile "Bonan matenon, Hagson."

Nun li diris:

—Bonan matenon, fraŭlino Logren, ĉiam same gaja kaj bela!

Ŝi vere ne klinsalutis. Ŝi bremsis abrupte, blekis, tiel ke du mevoj ricevis apopleksion kaj falis en la havenkanelon.

—Hontu, ulo!

Li faris ankoraŭ kelkajn senfortajn provojn, sed la rezulto estis katastrofa. Ĉiuj siblis kolere, ankaŭ la belaj.

Li ne komprenis tion.

En la plej kvieta tempo de la antaŭtagmezo, inter dek minutoj post la naŭa kaj la naŭa kaj duono, Hagson rimarkis, ke li estas tramalseka. Baldaŭ poste li komencis frostotremi.

Nu, tio estis bela. Unu el liaj plej agrablaj okupoj en la somero estis studi la knabinojn sur la plaĝoj. Por lia speco viro tio estis fruktodona plezuro kaj somera malvarmumo tial estis damne serioza afero. Neniu arbusto aŭ klifo povas kaŝi ternantan aŭ snufantan viron. Kio estis farenda devas esti farota tuj.

Li rapide elserĉis Unuan, klarigis, ke li estas tramalseka, ke li ekmalvarmumiĝas kaj ke li devas iri hejmen kaj surmeti ion sekan.

Unua rigardis super la okulvitroj.

—Ĉu vi estas malseka? li demandis. Kie tio okazis?

—Ĉit, ne amuziĝu, ĉi tio povas malfunkciigi vian tutan libertempan liston!

Unua fariĝis singarda. La kuglo trafis la celon.

—Kiom tio daŭros? li demandis.

—Dependas! Se mi promenas, daŭros du horojn, se mi veturas aŭtobuson, mia destino estas en la manoj de dio. Povas daŭri unu horon, povas daŭri tri. Alie . . .

Unua pripensis, komencante ĉe Alie . . . Li kaj Hagson kutimis eltrovi praktikajn solvojn. Hodiaŭ estis kunsido de la estraro. Oni tial sciis, kie estos la direktoroj kaj la aŭto.

—Ĉu vi povus komplezi kaj lavi la aŭton, li diris post pripenso. Mi sendos tien Froman intertempe!

—Bonege, ĉefo, diris Hagson. La ŝafaro estas kalkulita! Li forkuris sagorapide por ne doni al Unua eblecon ŝanĝi sin kaj revenis jam antaŭ la deka kaj duono, en sekaj vestaĵoj kaj kun fortigita memfido. Dudek minutojn post la deka montris la horloĝo en la granda bankhalo, iris glate. Sed Marcus jam estis pasinta.

En la vestiblo atendis lin unu el la grandaj surprizoj de lia vivo. Tie staris Froman kaj parolis amike kun Marcus.

Marcus estis akurata ĉi tiun tagon, kiel ĉiujn aliajn tagojn. Li aspektis meditema kaj tiuj, kiuj sciis, kiu li estas, ofte imagis, ke li cerbumadas pri milionnegocoj. Sed li devis pensi pri pli gravaj aferoj. Negocoj, same ĉu temis pri simpla ŝuldatesto je dekmil kronoj aŭ komplikita garantia prunto je cent milionoj da kronoj, estis nuntempe rutinaĵo por li, estis polvo por purigistino. Estis paperoj kaj ciferoj komparataj kun paperoj kaj ciferoj kaj

ne kaŭzis al li pli da malfacilaĵoj ol inundoj, kion tamen konstante kaŭzis lia kronika malsano. Pro tio ĉio alia estis por li indiferenta. Vetero kaj vento, alta aŭ malalta aerpremo signifis pli ol hipotekoj, obligacioj kaj interezmarĝenoj.

Pluvis abunde hodiaŭ matene. Estis agrable. Ĉesis pluvi pli poste en la antaŭtagmezo. Ankaŭ estis agrable.

Kiam li eniris la vestiblon, lian atenton kaptis juna viro, kiu staris kaj rigardis heziteme ĉirkaŭ si. Tra la tuta banko, de la plej alta ĉefo sur la soleca pinto ĝis la plej juna oficisto en la suba vico, "kliento" estis sankta koncepto. Ĉi tie estis kliento, kiu bezonis helpon. La sento pri la profesia devo tuj vekigis ene de Marcus kaj li ĉirkaŭrigardis por trovi Hagson. Tiu ne estis sur sia loko.

La juna viro aspektis simpatia kaj estis bone vestita. Li havis brunajn okulojn kaj la okuloj sufiĉis por sugesti al Marcus la penson, ke li havas eksterlandanon antaŭ si, eventuale francon, sed ĉiukaze iun sudlandan. Iliaj rigardoj renkontiĝis.

—Palévufraŭsé? la juna viro demandis ĝentile.

Jen, estis vera eksterlandano, franco, kiel li pensis!

Li estis ĝoja pri sia akrevideco; sed li ne estis ĝoja pri sia kono de la franca lingvo. Li estis farinta siajn bankstudojn en Britio kaj parolis la anglan flue. Sed lia franca estis trema.

Li neskuis la kapon.

—Je . . . li diris kaj miris, kiel diable oni diras bedaŭras.
I'm sorry . . . do you speak English?

Nun estis la vico de la eksterlandano neskui la kapon.

—Just a minute, momenton, Marcus diris fervore kaj iris al la giĉeto de Hagson. Li montris al la telefono kaj diris ion pri Telefono, Telefono.

Ŝajnis, ke la franco intencas diri ion, ĉar li malfermis la buŝon, sed en la sama momento Larsson venis promene laŭ la ŝtuparo.

—Larsson! Marcus vokis. Venu ĉi tien por momento!
Larsson alpaŝis kaj Marcus montris al la fremdulo.

—Bonan matenon, Larsson, ĉi tie estas franco, kiu celas ion. Bonvolu helpi lin, li ne komprenas la anglan!

Larsson rigardis la fremdulon konsternite.

—Ĉi tio, li diris, estas Froman, nia nova pedelo. Li evidente ne rekonas la direktoron, sed mi ne komprenas, kial li ne parolas svede.

—Kio nun! ekmiregis Marcus.

Sed Froman ne kolapsis pro tia bagatelaĵo.

—Mi pardonpetas, li diris trankvile, mi kredis ke la sinjoro estas franco, tial mi diris ekzakte, kion mi lernis.

—Forgesu tion, diris Marcus, la tuto estis en la vero komika. Li metis sian manon sur la ŝultron de Froman. Estis en la vero observema ago.

En tiu momento Hagson alvenis. Li tenis sin flanke konsternita, ĝis kiam Marcus foriris.

—Kion damnan vi nun faris? li demandis al Jan.

—Mi prezentis min al Marcus! Vi diris, ke daŭros dek jarojn, antaŭ ol li scios, kiu mi estas, kaj tiel longe mi ne intencas atendi.

Hagson estis trafita de lancino. Li konsideris sin kiel pli aĝa frato kaj kuratoro de Jan. Dum momento ŝajnis al li, ke li estas tutsimple objekto de ŝercmoko. Sed nur dum momento. Ĉar li estis certa, ke Jan estas ĝentila kaj bonvola junulo.

Li estis demandonta, kiel la tuto okazis, kiam la pordo malfermiĝis kaj iu eniris. Estis Kroll, li kiu estis malaten-tita je kontoro dek ses. Nun konsilu, kiu povas.

Kroll estis kvidekjara viro, alta kaj kun kurbaj ŝultroj. Li estis kalva, grandnaza kaj havis ruĝecan sansportan vizaĝon. Li estis kruskulo, manĝanto de avengria kaĉo. liaj okuloj estis viglaj kaj vekaj, kaj ĉirkaŭ lia buŝo vidiĝis ofte gaja rideto. Sed hodiaŭ pendis velke kaj la okuloj kaj la buŝo. Li estis kolerega je dio, la mondo, la registaro, la urba konsilantaro, ĉiuj partioj, sed plej multe je la banko kaj plej malmulte je komunismo. Ne ekzistis justeco, nek en ĉielo nek sur tero. Fervora kaj lojala oficisto estis sortobatita. Li neniom gravis kompare kun bo-fratoj kaj manĝetablaj kunuloj.

Bona dio, pensis Hagson rapide, donu al mi ideon, sed rapidu!

—Bonan tagon, sinjoro Kroll, li diris trankvile, kiel vi fartas hodiaŭ?

—Diable, Kroll diris mallonge. Ĉu Stenman enestas?

—Li faras, sed ĉu vi nepre devas renkonti lin hodiaŭ, li havas teruran humoron, mensogis Hagson.

Kontenta rideto lumigis la vizaĝon de Kroll.

—Do tiel, ĉu li havas! Jes, nepras! Mi legos la preĝolibron al li, li ne fariĝos pli gaja post tio!

—Sinjoro Kroll, Hagson diris rapide kaj sekigis la frunton per naztuko, aŭskultu min! Ne iru al Stenman ĝuste nun! Ĉiuj opinias, ke vi estis maljuste traktita, vi devas iri al Marcus.

La kriza situacio flustris al li la vortojn. Kroll ne rajtis iri al Stenman, ĉi tiu nur malbonigus la aferon. Li sciis nenion pri la ludo malantaŭ la kulisoj. Li devas iri al Marcus.

—Aspektu gaja kaj diru, ke vi estas ĉagrenita, li diris, kaj demandu, ĉu estas io speciala, kial Huss preteriras vin!

Kroll ne aspektis speciale konvinkita, sed diris ĝentile (ĉar pedelon, kiu ĉiun tagon rajtas diri bonan matenon kaj bonan vesperon al la plej alta ĉefo, oni ne simple neglektas):

—Eble!

—Bone, diris Hagson kaj faris rapidan puĉon: li ĵetis sin al telefono, faris numeron, antaŭ ol Kroll komprenis, pri kio temas, kaj diris:

—Saluton, Lasse, estas Hagson, se Marcus estas libera, demandulintujĉukrollpovasinterŝanĝikelkajnvortojnkunli!

—Ne, ne! Kroll kriis terurita, sed estis tro malfrue. Marcus estis akceptonta lin.

—Sed Hagson, diris Kroll kaj ĵetis senesperajn rigardojn al la pordo, tra kiu li ĵus tiel kolere eniris, kion mi diru al Marcus?

—Ekzakte tion, kion mi diris, diris Hagson kaj frapetis Kroll sur la ŝultron. Bonan sukceson.

—Estis malfacile, li diris al Jan kaj resekgis la frunton, dum Kroll kun rapideco de kulpulo moviĝis supren en la ŝtuparo.

—Vi diris hieraŭ, ke vi ĉefigis Huss en dek ses, Jan diris intense. Ĉu vi opinias, ke tio estas justa?

—Kviete, kviete, diris Hagson. Tion vi ne komprenas. La vico de Kroll estos venontjare, li ricevos bonan oficon de mi! Vi vidis, ke li estos gaja, kiam li revenos.

Gaja estis malforta vorto, li radiis.

—Hagson! li ekkriis. Vi estas mia plej bona amiko! Ĉu ni ciumu?

—Dankon, dankon! diris Hagson. Kion li diris?

—Estas ŝtatsekreto, mi ne diros! Sed atendu nur! Refoje dankon, dankon! Ĉi vespere mi ĝojege petolos kaj vi kun mi! Mi invitas! Diru, kien ni iru!

—Grand, Jan diris duonlaŭte al Hagson. Mi scias, ke ili ne servas kruskon!

—Mi neniam estis en Grand, diris Hagson.

—Bonege do, Grand! Je la sepa kaj duono, ĉu?

Li dancis eksteren tra la pordo kaj laŭ Havenstrato al sia oficejo. Baldaŭ post lia foriro alvenis iu alia kaj montris sian plej gracoplenan rideton al Jan. Estis Stenman.

Marcus havis ĝentilan momenton kaj telefonis al Stenman kaj rakontis, kiel viglan kaj observeman junulon ili havas en la enirejo. Jam delonge Stenman ne ricevis komplimenton de la pej alta ĉefo, kaj ĝin li englutis avide. Li diris modeste ke, kiam oni estis tiom longe ĉefo de la personaro kiom li, oni scias prijuĝi homojn kaj li tuj kotopo kotopo. Certe, certe! diris Marcus en tiel kora tono, ke Stenman opiniis sin same kapabla kiel Freud.

Nun li venis proprainiciate kaj li faris ceremonieton el la tuto. Li donis nome kaj frapeton sur la ŝultron kaj gazeteltondaĵon de antaŭ du jaroj. Kaj li diris solene:

—Vi bone kondukis, Froman, mi havas honoron je vi. La fotoj sur ĉi tiu eltondaĵo montras la direktoraron, vi lernu, kiel la direktoroj aspektas. Mi volas rehavi la el-

tondaĵon ĉi posttagmeze. Kaj mi havas la taskon de Marcus informi vin, ke ĉiuj direktoroj parolas la svedan lingvon.

—Dankon, sinjoro kontisto, diris Jan.

—Dankon, kamarado, flustris Hagman en la fono.

Solenan distancon for ludis tri monerkalkuliloj, dek kvin kalkul- kaj kvardek kvin skribmaŝinoj dum la akto. Estis la Kroniga marŝo de Mamono el la opero Fuĝo for de la Kapitalo de kamarado Prokofjev. La solopartojn kontribuis la stratbruo, kiu envenis ĉiun fojon, kiam la pordo malfermiĝis.

Jan ankaŭ konatiĝis kun Huss kaj Fris.

Unue Huss venis.

—Saluton, Hagson, kiel statas cetere?

Jan rigardis lin atente, li admonis al tio. Jan konis homojn kaj homon per legitaj libroj, sed li neniam pli frue pensis, ke ekzistas rekta ligo inter homo en libro kaj en realo. Ĉi tie tamen venis persono, pri kiu li povus ĵuri, ke li legis pri li en iu marromano. Eventuale eĉ unu el la kadetoj de Marryat. Regulaj vizaĝtraĵoj, iom krispa hararo, kvietaj movoj kaj ŝtala rigardo. Pli verŝajne estonta komandanto sur fregato ol en aĉa banka kontoreto, eĉ se ĝi situas proksime al fiŝbazaro.

Hagson povis fieri pri sia elekto.

—Saluton, Huss, diris Hagson, estis plaĉa surprizo, ĉu?

Huss ne respondis al la demando, ĉar li ne cerbumis, kial li kaj ne iu alia; li same malmulte cerbumus, se ne estus li sed iu alia. La homoj el la insularo akceptas la aferojn, kiaj ili venas. Ne utilas cerbumi pri fundamentaj aferoj, kial la vento venas de oriente, kiam oni deziras okcidentan venton, do kial oni cerbumu pri la malpli gravaj?

—Ĉu Stenman enestas? li demandis.

—Jes certe, nur rapidu!

—Ĝis do!

—Ĉu li ne iros al Marcus? Jan miris.

—Sed kial? Marcus jam vidis lin. Cetere li havos estrarkunvenon post momento. Psst! Jen venas Fris!

Profunde klinsalutante Hagson paŝis malantaŭen kaj donis lokon al maljuna viro, kiu envenis kiel vento tra la pordo kaj malaperis same rapide sur la ŝtuparon. Tiu ne resalutis.

—Prezidanto de la estraro, prezentis Hagson. Direktoro Fris.

—Dankon, dankon, diris Jan kaj klinis sin en la direkton de la ŝtuparo. Terure, kiel respekto plena vi estas!

—La ulo ja estas milionulo!

Ĉiu eklezio havas sian dion kaj siajn pastrojn, Jan ne pensis pri tio. Li estis la dio de la banko.

Fris ne estis ŝatata de Hagson (kaj ankaŭ ne de Marcus, kiu estis tolerema persono). Li rakontis, kion li scias pri Fris kaj Jan komprenis tion en sia maniero.

Fris estis unu el la grandaj personecoj de la urbo. Li faris negocojn per nemoveblaĵoj kaj akcioj, oni diris, ke li posedas duonan urbon kaj decidas pri la alia duono. Hagson sciis, pri kio li parolas, ĉar parto de lia laboro estis ĉiutage telefoni al Fris kaj informi pri la akciaj kurzoj, tuj kiam oni telefone ricevis ilin el Stokholmo. Neniu alia volis. En ĉiuj signifaj entreprenoj Fris partoprenis kaj kuntiris la fadenojn. Per li la banko povis kontroli multajn grandentreprenojn en ĝia agosfero.

Li ankaŭ kontrolis la bankon, sed ja . . .

Li memorigis pri nenio, kun kio Jan konatiĝis en la libroj. Li estis en ĉio la kontraŭo de neŭrozo. Ne ekzistis io same granda.

Lian animon ne pezigrigis nenecesaj scioj, ĉar li ĉiam tenis sin al siaj propraj intereso, li estis libera anime kaj sendependa ekonomie. Li cedis nek al kuracistoj nek dentistoj, ĉar li havis bonan sanon kaj sanajn dentojn.

Li estis pli forta ol iu pratempa despoto kun sklavo, kiu flustris en la orelon: Sinjoro, pensu, ke vi estas mortideva! ĉar li ne kredis en senmortecon kaj ne estis superstiĉa.

Li estis pli potenca ol la feŭdalaj markgrafoj — kun kiuj li cetere havis multajn komunajn punktojn — ĉar

tiuj havis dion, konfesprenanton kaj konsciencan. Fris estis ateisto kaj spertulo pri librotenado kaj akcioj.

Por li la universo estis kreita.

Ke la banko havas estraron, estis novaĵo por Jan. Kaj ĉu eblis, ke la membroj de la estraro havas tiun gravan oficon kiel kromtaskon? Hagson ne opiniis, ke tio estas rimarkinda. Akraj cerboj, li opiniis, prijuĝas en dekona sekundo tion, por kio vi kaj mi bezonas monatojn. Cetere, Marcus ĉeestas kaj tiam ne okazos stultaĵoj.

La kompreno de Hagson pri la taskoj de la estraro estis iom simpla kaj malbone informita: ĝi aprobis pruntojn kaj decidis pri dividendoj; ĝi antaŭ ĉio zorgis, ke la kreditoj kaj salajroj ne fariĝu tro altaj. Kelkfoje ĝi ankaŭ konfirmis gravajn decidojn faritajn de Marcus kaj Hagson pri promocioj. Krom tio ĝi ŝatis bonan manĝon — ne konservojn — kaj ne maldankis al botelo da multekosta vino. Dum teatraj premieroj oni trovis ĝin en la parteroj, kaj kiam ŝipo estis baptota, ĝi ŝprucis ĉampanon sur ĝin.

Jan ensuĉis ĉiun vorton, kiun Hagson diris, liaj vangoj flamis, liaj okuloj brilis.

Hagson semis venton.

La promocio de Huss funde skuis la bankon. Hagson rapide kaptis famojn kaj registris la efikon ĝis la vestiblo. Oni trakribis la parenccaran registron de Huss tien kaj

reen kaj estis rimarkeble, kiom oni sciis pri la nekonata junulo, kiam oni kunmetis ĉiujn partetojn. Ĉiuj provis trovi parencecon kun la direktoraro kaj trovis nenium. Huss havis fianĉinon, junan, naivan knabinon el la insularo. Estis nepenseble, ke ŝi havu koramikon en la direktoraro.

Restis nur la konkludo, ke Huss estis elektita pro siaj meritoj. Tiu konkludo finigis la diskutojn. La sola bojaĉanto estis Westin.

—Kiel oni povis malatenti Kroll! li ekkriis kolereme, ĉiam kiam la afero estis preparolata. Senrespekte! Westin kutimis normale samopinii kun la direktoroj en ĝojo kaj malĝojo.

Oni rakontis post ĉi tiu promocio, ke Haringobanko estis la sola, kiu promocias la homojn laŭ iliaj meritoj. La onidiroj pri tio trapuŝis sin ekster la bankon kaj havigis al Stenman flatan atenton. Personarĉefoj en aliaj bankoj kaj grandentreprenejoj prenis kontakton kun li por elflari liajn sekretojn, kaj li respondis sensanĝe, ke la a kaj z estas ĝisfunda kono de la personaro kaj sesa senso por la psikaj kvalitoj de homoj. Li sciis tion, la bona Stenman.

Jes ja, li eĉ prelegis pri tio.

John Einar Åberg

Sesa ĉapitro el samtitola romano

El la sveda tradukis Franko Luin

La tri malaltaj mesoj

I

Ĉu trufitaj meleagroj, Garrigou? . . .”

”Jes, via pastra Moŝto, du grandiozaj meleagroj farĉitaj per trufoj. Mi scias ion pri tio, ĉar mi mem helpis plenigi ilin. Oni dirus, ke ilia haŭto fendiĝos dum la rostado, tiom ĝi estas streĉita.”

”Jesu’-Mario! mi, kiu tiel amas trufojn! . . . Donu al mi tuj mian surplison, Garrigou . . . kaj krom la meleagroj, kion plue vi vidis en la kuirejo?”

”Ho! ĉiajn bonaĵojn . . . Depost tagmezo ni faris nenion alian ol senplumigi fazanojn, vanelojn, kokidinojn, tetrojn. Plumoj disflugis ĉie. Poste el la lageto oni alportis angilojn, orajn karpojn, trutojn kaj . . .

”Kiel grandaj la trutoj, Garrigou?”

”Tiel grandaj, via moŝto . . . kolosaj!”

”Ho! Dio! ŝajnas al mi, ke mi jam ilin vidas . . . ĉu vi metis la vinon en la mesboteletojn?”

”Jes, via moŝto, mi metis la vinon en la mesboteletojn . . . Sed, sankta Patrino! ĝi ne egalvaloras tiun, kiun vi baldaŭ trinkos elirinte de la noktomeza meso. Se vi vidus tion en la manĝosalono de la kastelo, tiom da karofoj, kiuj flamas plenaj da vinoj ĉiukoloraj . . . kaj la arĝentan ujaron, la ĉizitajn ornamaĵojn, la florojn, la kandelinarojn! . . . Neniam vidiĝis tia nokta festeno. La sinjoro markizo invitis ĉiujn sinjorojn najbarajn. Vi estos almenaŭ kvardek ĉetable, ne kalkulante la intendanton kaj la notarion . . . Ha — vi estos tre feliĉa esti inter ili, via moŝto! Nur flarinte tiujn belajn meleagrojn, mi estos ĉie sekvata de laodoro de trufoj . . . Mhfm! . . .”

”Nu do, mia infano. Ni gardu nin kontraŭ la peko de manĝegamo, precipe dum la Sankta Naskonokto. Rapiĉdu ekbruligi la kandelojn kaj sonorigi la unuan frapon de la meso; ĉar jen proksimiĝas noktomezo, kaj ni ne malfruiĝu . . .”

Tiu ĉi konversacio okazis iun Kristnaskan nokton en la jaro de graco mil sescent iom, inter la respektinda Dom Balaguère, antaŭa preĝisto de la Barnabidoj, tiutempe privata kapelano de la sinjoroj de Trinquelage, kaj lia malgranda helpanto Garrigou, aŭ almenaŭ tiu, kiun li kredis esti la malgranda komizo Garrigou, ĉar vi devas scii, ke la diablo tiun vesperon estis surprreninta la rondan vizaĝon kaj la sendifinajn trajtojn de la juna sa-

kristiano por pli efike konduki la sanktan patron en tenton, kaj igi lin fari teruran pekon de manĝegamo. Do dum la ŝajna Garrigou (hm! hm!) sonorigis per brakoturno la sonorilojn de la sinjora kapelo, la pastro finsurmetis sian ĉazulon en la malgranda sakristio de la kastelo, kaj, kun animo jam maltrankvila pro ĉiuj ĉi gastronomaj priskriboj, li ripetis al si sin vestante:

”Rostitaj meleagroj . . . oraj karpoj . . . trutoj tiel grandaj!”

Ekstere la nokta vento blovis, disigante la muzikon de la sonoriloj, kaj iom post iom lumoj aperis en la ombro sur la flankoj de la monto Ventoux, ĉe kies supro leviĝis la malnovaj turoj de Trinquelage. Estis farmistaj familioj venantaj por aŭdi la noktomezan meson ĉe la kastelo. Ili grimpis la deklivon kantante en grupoj de kvin aŭ ses, la patro antaŭe, kun lanterno en la mano, la virinoj envolvitaj en siaj grandaj brunaj manteloj, en kiujn la infanoj premis sin kaj ŝirmiĝis.

Malgraŭ la horo kaj la malvarmo, ĉiuj ĉi bravuloj marŝis gaje, subtenataj de la ideo, ke post la meso troviĝos, kiel ĉiujare, tablo kovrita por ili malsupre en la kuirejoj. Jen kaj jen sur la kruda suprenvojo la kaleŝo de iu sinjoro, antaŭirata de torĉportantoj, speguligis siajn vitraĵojn en la lunlumo, aŭ eble mulo trotis skuante siajn tintilojn, kaj per la lumo de siaj lanternoj envolvitaj per

nebulo, la farmistoj rekonis sian intendanton kaj salutis lin pasanta:

”Bonan vesperon, bonan vesperon, mastro Arnoton!”

”Bonan vesperon, bonan vesperon, miaj infanoj!”

La nokto estis klara, la steloj brilis pro la malvarmo: la venteto pikis, kaj maldensa neĝpluvo, glitante sur la vestojn sen malsekigi ilin, konservis fidele la tradicion de Kristnaskoj blankaj pro neĝo. Tute supre de la deklivo la kastelo vidiĝis kiel la celo, kun sia grandega amaso da turoj kaj pinjonoj, la sonorilturo de sia kapelo supreniranta en la blunigran ĉielon, kaj multegaj malgrandaj lumoj, kiuj palpebrumis, iris, venis, moviĝis ĉe ĉiuj fenestroj, kaj similis, sur la malhela fono de la konstruaĵo, al fajreroj kurantaj en cindroj de brulinta papero. Pasinte la levponton kaj la poternon oni devis, por iri en la kapelon, transiri la unuan korton, plenan de kaleŝoj, lakeoj, seĝveturiloj, tute luman pro la fajro de la torĉoj kaj la flamado de la kuirejoj. Audiĝis tintado de rostoppinglo, klakado de kaseroloj, kunfrapado de vitraĵoj kaj arĝentaĵoj movataj dum pretigo de manĝo; super ĉio varmeta vaporo, kiu bone odoris je rostitaj viandoj kaj la fortaj herboj de la komplikitaj saŭcoj, igis la farmistojn diri, kiel ankaŭ la pastron, kiel ankaŭ la intendanton, kiel ankaŭ ĉiujn:

”Kian bonan noktfestenon ni faros post la meso!”

II

Drelindin din! . . . Drelindin din! . . .
Estas la noktomeza meso, kiu komenciĝas. En la kapelo de la kastelo, malgrandskala katedralo, kun interkrucaj arkaĵoj kun lignaĵoj el kverko, suprenirantaj ĝis la alteco de la muroj, la tapetoj estas sternitaj, kaj ĉiuj kandeloj lumigitaj. Kaj kiom da homoj! Kaj kiom da tualetoj! Jen unue, sidantaj en la skulptitaj benkoj ĉirkaŭ la ĥorejo, la sinjoro de Trinquelage, en vesto el salmkolora tafto, kaj proksime al li ĉiuj invititaj nobeloj. Kontraŭflanke, sur preĝoseĝoj veluritaj, lokiĝis la maljuna markizino-vidvino en sia robo el fajrokolora brokato, kaj la juna sinjorino de Trinquelage kapvestita per alta turo el krispigita punto laŭ la lasta modo de la franca kortego. Pli malsupre vidiĝas, nigre vestitaj, kun vastaj pintaj perukoj kaj razitaj vizaĝoj, la ĉefintendanto Tomaso Arnoton, kaj la notario mastro Ambroj, du seriozaj notoj inter la luksaj silkaĵoj kaj stebitaj damaskoj. Poste venas la dikaj seneskaloj, la paĝioj, la eskviroj, la kelneroj, sinjorino Barbe, kies ĉiuj ŝlosiloj pendis ĉe ŝia flanko, de ŝlosilringo el delikata arĝento. Funde, sur la benkoj, estas la subularo, la servistoj, la farmistoj kun siaj familioj, kaj fine, tie transe, apud la pordo, kiun ili duonmalfermas kaj refermas diskrete, kaserolistoj, kiuj venas inter du saŭcoj por ricevi iom da mesatmosfero kaj alporti odo-

ron de festeno en la preĝejon tute festan kaj varmetan pro tiom da lumigitaj kandeloj.

Ĉu estas la vido de tiuj malĉrandaj blankaj biretoj, kiu disturnas la atenton de la diservanto? Ĉu ne estas pli ĝuste la tintilo de Garrigou, tiu freneza tintileto, kiu skuigas ĉe la piedo de la altaro kun infera rapideco kaj ŝajnas diri la tutan tempon:

”Rapidu ni, rapidu ni . . . Ju pli baldaŭ ni finos, des pli baldaŭ ni estos ĉe la tablo.”

La fakto estas, ke ĉiufoje, kiam tintas tiu diabla tintilo, la kapelano forgesas sian meson kaj pensas nur pri la festeno. Li imagas la kuiristojn diskurantajn, la fornojn, kie brulas forĝofajro, la vaporon, kiu supreniras el duonmalfermitaj kovriloj kaj en tiu vaporo du grandiozajn meleagrojn, farĉitajn, streĉitajn, marmorumitajn per trufoj.

Aŭ alimomente li vidas pasi vicojn da paĝioj portantaj pladojn ĉirkaŭitajn de tentaj vaporoj, kaj kun ili li eniras la grandan salonon jam pretan por la festeno. Ho ravoj! Jen la grandega tablo tute ŝargita kaj flamanta, la pavoj vestitaj per siaj plumoj, la fazanoj apartigantaj ruĝbrunajn flugilojn, la flakonoj rubenkoloraj, la piramidoj da fruktoj brilantaj inter la verdaj branĉoj, kaj tiuj mirindaj fiŝoj pri kiuj parolis Garrigou (Ha! jes ja, Garrigou) kuŝigitaj sur fenkolo kun skvamoj perlosimilaj kvazaŭ ili ĵus eliĝis el la akvo kaj kun bukedo da odoran-

taj herboj en siaj monstraj naztruoj. Tiel viva estas la vizio de tiuj mirindaĵoj, ke ŝajnas al Dom Balaguère, ke ĉiuj ĉi miraklaj pladoj estas servitaj antaŭ li sur la brodaĵoj de la altartuko, kaj du-trifoje anstataŭ *Dominus vobiscum!* li trovas sin dirantan la *Benedicite*. Aparte de tiuj malgrandaj eraroj, la dignulo plenumas tre konsciencie sian oficon, ne pasante linion, ne forlasante unu genuflekson; kaj ĉio bone iras ĝis la fino de la unua meso; ĉar vi scias, ke Kristnaskan tagon la sama diservanto devas soleni tri sinsekvajn mesojn.

”Jen unu!” diras al si la pastro, kun ekĝemeto de kvietigo; tiam, ne perdinte minuton, li signas al sia helpanto, aŭ tiu, kiun li kredas esti lia helpanto kaj . . .”

Drelindin din! . . . Drelindin din!

Estas la dua meso, kiu komenciĝas, kaj kun ĝi komenciĝas ankaŭ la peko de Dom Balaguère.

”Rapide, rapidu ni,” krias al li per sia acida voĉeto la tintilo de Garrigou, kaj ĉi tiun fojon la malfeliĉa diservanto, tute fordonita al la demono de manĝegamo, ĵetas sin sur la preĝlibron kaj manĝegas la paĝojn en avideco de sia troekscitita apetito. Freneze li kliniĝas, releviĝas, skizas la krucosignojn, la genufleksojn, mallongigas ĉiujn siajn gestojn por pli baldaŭ esti fininta. Apenaŭ li etendas la brakojn ĉe la Evangelio, frapas la bruston ĉe *Confiteor*. Inter la helpanto kaj li estas konkuro, kiu el ili pli rapide balbutos. Versetoj kaj respondoj akceliĝas,

interfrapadas. La vortoj duone elparolitaj, kio okupus tro longan tempon, finiĝas per murmuroj nekompreneblaj.

Oremus ps . . . ps . . . ps . . .

Mea culpa . . . pâ . . . pâ . . .

Simile al urĝigataj vinrikoltistoj premantaj la vinberojn en la kuvego, ambaŭ disvadas en la latino de la meso, sendante ŝprucaĵojn ĉiufanken.

”*Dam . . . scum!*” diras Balaguere . . . ”*Stutuo! . . .*” respondas Garrigou; kaj la tutan tempon jen la diabla tintileto tintanta en iliaj oreloj, kiel la sonoriletoj, kiujn oni metas sur la poŝtoĉevalojn por galopigi ilin rapidege. Pensu, ke tiamaniere malalta meso estas baldaŭ plenumita.

”Jen du!” diras la pastro tute senspira; tiam, ne prenante la tempon por spiri, ruĝa, ŝvitanta, li malsuprenkuras la ŝtupojn de la altaro kaj . . .

Drelindin din! . . . Drelindin din!

Estas la tria meso, kiu komenciĝas. Necesas fari nur kelkajn paŝojn plu antaŭ ol veni en la manĝosalonon; sed ve! ju pli proksimiĝas la festeno, des pli la malbon-sorta Balaguere sentas sin kaptita de frenezo de senpacienco kaj manĝegamo. Lia vizio pliklariĝas, la oraj karpoj, la rostitaj meleagroj estas tie, tie, . . . Li ilin tuŝas li ilin . . . Ho! Dio! . . . La pladoj fumas, la vinoj dolĉodoras; kaj skuante sian sonorilon sorĉitan, la tintilo krias al li:

”Rapide, rapide, ankoraŭ pli rapide! . . .”

Sed kiel li povus iri pli rapide? Liaj lipoj apenaŭ moviĝas. Li ne plu elparolas la vortojn . . . krom se li tute friponus Dion kaj forĵonglus lian meson . . . kaj jen kion li faras, malfeliĉulo! De tento al tento, li komencas transalti verseton, poste du. Kiam la epistolo estas tro longa, li ĝin ne finas, ektuŝas la Evangelion, pasas preter *Credo* ne enirante, saltas la *Pater*, salutas de malproksime la antaŭparolon, kaj per saltoj kaj ekflugoj sin ĵetas tiel en eternan kondamnon, ĉiam sekvata de la malbeninda Garrigou (*vade retro, Satanas!*), kiu subtenas lin per mirinda alianco, forprenas lian ĉazulon, turnas duope la foliojn, pusegas la pupitrojn, renversas la mesboteletojn, kaj senĉese skuas la malgrandan tintilon pli kaj pli forte, pli kaj pli rapide.

Oni devus vidi la maltrankvilegan vizaĝon, kiun montras la ĉeestantaro. Devigate sekvi, imite al la pastro, tiun ĉi meson, de kiu ili ne komprenas unu vorton, iuj leviĝas, kiam la aliaj surgenuas, sidiĝas, kiam la aliaj staras; kaj ĉiuj fazoj de ĉi tiu unika diservo konfuziĝas sur la benkoj en amaso de diversaj pozoj. La Kristnaska stelo, irante sur la vojo de la ĉielo tien, kie estas la malgranda stalo, paliĝas pro timego, vidante ĉi tiun konfuzon.

”La abato iras tro rapide . . . oni ne povas sekvi,” murmuris la maljuna vidvina moŝto, skuante sian kuŝon, konfuzite.

Mastro Arnoton, kun siaj grandaj stalaj okulvitroj sur la nazo, serĉas en sia preĝaro, kie diablonome oni do estas. Sed profunde, ĉiuj tiuj bravuloj, kiuj ankoraŭ pensas pri festenado, ne bedaŭras, ke la meso iras tiel kurierre, kaj kiam Dom Balaguère, kun radianta vizaĝo, sin turnas al la ĉeestantaro, kriante plenforte: *Ite, missa est*, estas nur unu voĉo en la kapelo por respondi al li per *Deo gratias* tiel ĝoja, tiel rava, ke oni kredus sin jam ĉe la tablo je la unua toasto de la noktfesteno.

III

Kvin minutojn poste la amaso da moŝtuloj sidiĝis en la granda salono, la pastro meze de ili. La kastelo, lumigita de supra ĝis malsupro, resonadis per kantoj, krioj, ridoj, bruoj; kaj la respektinda Dom Balaguère plantis sian forkon en flugilon de kokidino, dronigante la memriproĉon pri sia peko sub la ondoj de papa vino kaj la bona suko de viandoj. Tiom li trinkis kaj manĝis, kompatinda sanktulo, ke li mortis nokte pro terura atako, ne havinte eĉ la tempon por penti; tiam, matene li alvenis en la ĉielo ankoraŭ tute maltrankvila pro la festado de la nokto, kaj mi lasas al vi pensi, kiel li estis tie akceptata.

”Retiru vin de miaj okuloj, malbona kristano!” diris al li la suverena Juĝanto, ĉies nia mastro. ”Via kulpo estas

sufiĉe granda por forviŝi tutan vivon de virto! . . . Ha! vi ŝtelis de mi unu noktan meson . . . Nu bone! vi pagos al mi tricent en ĝia loko, kaj vi eniros en paradizon nur kiam vi estos soleninta en via propra kapelo ĉi tiujn tricent Kristnaskajn mesojn en la ĉeesto de ĉiuj, kiuj pekis pro via kulpo kaj kun vi . . . ”

. . . Kaj jen la vera legendo pri Dom Balaguère, kiel oni ĝin rakontas en la lando de olivoj. Hodiaŭ la kastelo de Trinquelage ne plu ekzistas, sed la kapelo ankoraŭ staras ĉe la supro de la monto Ventoux, en bukedo da verdaj kverkoj. La vento klakigas ĝian disrompitan pordon, la herbo kovras la sojlon; troviĝas nestoj ĉe la anguloj de la altaro, kaj en la embrazuro de la altaj fenestroj, kies koloraj vitraĵoj jam de longe malaperis. Tamen ŝajnas, ke ĉiujare, je Kristnasko, supernatura lumo vagas inter ĉi tiuj ruinoj, kaj ke irante al la mesoj kaj noktaj festenoj, la kamparanoj vidas ĉi tiun fantomon de kapelo lumigita de nevideblaj kandeloj, kiuj brulas en la libera aero, eĉ sub la neĝo kaj la vento. Vi ridu pri tio, se vi volas, sed vinberkulturisto nomata Garrigue, sendube ido de Garrigou, certigis al mi, ke iun Kristnaskan vesperon, iom drinkinte, li perdiĝis en la monto flanke de Trinquelage; kaj jen kion li vidis . . . Ĝis la dekunua horo, nenion. Ĉio estis silenta, estingita, senviva. Subite, ĉirkaŭ noktomezo, sonis sonorado ĉe la supro de la sonorilturo, malnova, malnova sonorado, kiu ŝajnis esti

tridek mejlojn for. Baldaŭ sur la suprenira vojo Garrigue vidis tremi fajrojn, moviĝi sendifinajn ombrojn. Sub la portiko de la kapelo, oni marŝis, oni flustris:

”Bonan vesperon, mastro Arnoton!”

”Bonan vesperon, bonan vesperon, miaj infanoj! . . .”

Kiam ĉiuj estis enirintaj, mia vinberisto, kiu estis tre kuraĝa, proksimiĝis kviete kaj, rigardante tra la rompita pordo, ricevis strangan vidaĵon. Ĉiuj el la homoj, kiujn li vidis pasi, estis aranĝitaj ĉirkaŭ la ĥorejo, en la ruina navo, kvazaŭ la malnovaj benkoj ankoraŭ ekzistus. Belaj sinjorinoj en brokato kun puntaj kufoj, sinjoroj broditaj de supro ĝis malsupro, kamparanoj en floritaj jakoj, kiajn havis niaj avoj, ĉiuj kun aspekto maljuna, velkin-ta, polva, laca. Jen kaj jen noktaj birdoj, kutimaj gastoj de la kapelo, vekitaj de ĉiuj ĉi lumoj, venis vagi ĉirkaŭ la kandeloj, kies flamoj supreniris rekte kaj malklare kvazaŭ ili brulus malantaŭ gazo; sed kio multe amuzis Garrigue, tio estis individuo kun grandaj ŝtalaj okulvitroj, kiu ĉiumomente skuis sian altan nigran perukon, sur kiu unu el tiuj birdoj staris tute ŝtonigita, silente batante per la flugiloj.

Ĉe la fundo, malgranda maljunulo de infana alteco, surgenuje meze de la ĥorejo, skuis malesperege tintilon sen sonorilo kaj sen voĉo, dum pastro, vestita per malnova oro, iris, venis antaŭ la altaro, deklamante preĝojn,

de kiuj oni ne komprenis unu vorton . . . Ja certe estis Dom Balaguère, diranta sian trian malaltan meson.

Alphonse Daudet

El franca tradukis Fred. E. Wadham

La ĝibulo

Li estis pursanga ĝibulo kun pala vizaĝo, larĝa buŝo kun maldikaj ruĝaj lipoj, mallarĝaj malhelaj okuloj kaj brilaj nigraj haroj. Kaj kiel ĉe la plej multaj ĝibuloj lia kapo estis premita malantaŭen, kie ĝi sidis profunde inter la ŝultroj kaj donis al la tuta figuro ion groteske arogan kaj malhumilan.

Li vivis en komforta duĉambra loĝejo en la orienta parto de la urbo, kie liaj amikoj, pliparte artistoj, volonte kolektiĝis, malpli pro simpatio al la gastiganto ol pro egoistaj motivoj. Li travidis ilin kaj venĝis sin per males-timo tiel lerte kaŝita, ke eĉ la plej sagaca el ili opiniis sin nemalhavebla en liaj komfortaj foteloj. En certa maniero tiuj amikoj estis nemalhaveblaj al li. Li bezonis ilian ne-konscian admiron por povi plene ĝui la spriton kaj sa-gacon de sia propra pensado, li sentis plezuron nerimar-keble gvidi kaj plivigliki konversacion kaj elsuĉi ĝis ek-stremo ilian intelekton. Sed li sentis plezuron kvazaŭ de fora malproksimo, proksimume tiel kiel malsana infano sentas plezuron rigardante la ludojn de aliaj infanoj.

Li estis bona muzikisto kaj pro ironia kaprico de la sorto li estis dotita de eksterordinare fortaj kaj belaj manoj, kiuj povis ensorĉi, kiam li glitigis ilin sur la klavaro.

Iun vesperon, kiam kolektiĝis ĉe li la amikoj, kiuj ankaŭ enkalkulis virinojn, kaj li sidis ĉe la piano. Nina, la skulptistino, foriris de la aliaj kaj stariĝis apud li. Nina eble estis la sola el ili, kiun li iomete estimis, pro ŝia kvietaj kaj senartifika naturo. Nun li kaŝe observis ŝin kaj vidis, kiel ŝiaj okuloj sekvas ĉiujn movojn de liaj manoj; li vidis kiel ŝi ĝuas ilin. Kaj li komprenis ŝin. Li mem estis esteto. Li komprenis, kiel la mallaŭta muziko sub la kvietaj movoj de liaj manoj fariĝas estetika ĝuo same objektiva kiel pejzaĝo aŭ birdotrilo. Kaj subite la amplekso de lia malfeliĉo tiel forte aperis en lia konscio, ke li sentis ĝin kvazaŭ korpan doloron. Kaptis lin fortega kolero kaj senbrida deziro ofendi kaj, abrupte interrompante sian ludon, li suprenrigardis al Nina, kaj li mem sentis, kiel malico brulas en la okuloj.

—Mi scias, kion vi pensis.

—Nu, kion mi pensis?

—Vi pensis, ke se tiuj manoj apartenus al alia viro, oni povus akcepti kaj karesojn kaj batojn de ili kaj tamen ilin kisi, se ili nur volus karesi kaj bati.

Nina rigardis lin kun silenta miro. Ŝi ruĝiĝis malrapide, kaj kun tremeto ŝi forturnis sin de li kaj iris al la aliaj.

En la sama momento, kiam li komprenis, ke fakte estis grajno da vero en liaj vortoj, li pentis ilin. Li al iris al Nina.

—Ĉu vi povas pardoni al mi? li mallaŭte demandis.

—Mi havas nenion por pardoni.

—Tamen, kaj mi hontas.

—Estas mi, kiu devus honti.

—Kial?

—Ĉar mi estas ordinara, tro malgranda homo.

—Prefere estu fiera, ke vi estas sufiĉe sana por esti ordinara homo. Li forlasis ŝin kaj aliĝis al la aliaj.

Vespere, kiam ĉiuj estis for, li eliris sur sian balkonon. Nudkapa li staris en la vintra nokto vidante la fenestrojn kaj lanternojn de la urbo brileti kvazaŭ lumraŭpoj en la mallumo, li klinis sin antaŭen kaj rigardis malsupren al la ŝtona pavimo de la strato: nur unu paŝo en la eternon. Sed li sciis, ke neniam li ekprenos tiun paŝon — jen lia mizero, ke li ĉiam regas sin mem kaj neniam sufiĉe perdos la sinregon por fari la eksalton. Povas esti ankaŭ, se li volus esti sincera, ke li amas la vivon. Suno, steloj, maro, tero apartenas tiom al li kiom al la aliaj homoj, li sentis preskaŭ malican ĝojon je la penso, ke tion oni ne povas forpreni de li, kiom ajn li blasfemas la vivon.

Li rigardis supren al la steloj, tio kutimis trankviligi lin, li sentis sin pli intima kun la steloj ol kun la urbaj domoj, el kiuj brilis la fajro de la homoj. Supren rigardante li plej facile forgesis, ke li estas "stampita," lia persona sorto iĝas tiel konsole bagatela, kaj la sola granda kaj daŭra estas la kapturna flugo de la penso al la senfino. Ĉio tio ĉiutaga, vesto kaj manĝo, hejmo kaj laboro, tio kio donas al la homo sekurecon kaj apogon, kiam li suriris la glitan glacieron de cerbumado, kaj la angoro volas lin kapti — tio estas maltrankvilo kaj turmento al li. Pro tio, ke lia spino estas difektita. Ĝuste tio! Lia spino estas deformita. Tial lia animo devas serĉi al si pacon sur vojoj, kie teruriĝas tiuj de la aliaj . . . Lia suprenturnita vizaĝo brilis pala, liajn maldikajn lipojn disigis ride-to de profunda ironio, sed la postan sekundon lia vizaĝo kuntiriĝis en dolorplena furiozo, li pugnigis la manojn ĉirkaŭ la balkona balustrado tiel forte, ke la artikoj blankiĝis . . . Li streĉis kaj klinis sin antaŭen, sed ne sufiĉe streĉis, ne sufiĉe klinis — ĝuste tiom, ke li ne falu — turnis sin kaj eniris.

Se li iam en la strato renkontas aliajn ĝibulojn, lia sola sento estas estetika malplaĉo. Li sentas neniun kompton, eĉ malpli solidarecon. Cetere li ne dubas, ke ekzistas feliĉaj ĝibuloj: malfeliĉo estas malfeliĉo nur laŭ tio, kiel ĝi donas koloron al la menso de homo.

Ian perversan ĝuon li trovis studante, kiel li mem impresas homojn, kiujn li renkontas. Sur la vizaĝoj de la nejunaj virinoj ĉiam estas legebla la sama, supraĵe bonvola "kompatinda homo" kiel sur tiuj de la viroj bonhumora "kompatinda diablo." Sed la junajn virinojn li povas dividi en plurajn kategoriojn: sanaj egoistoj, kiuj ne kaŝas sian antipation, sentimentalaj, kiuj donas al li okulojn preskaŭ larmantajn, kaj senpensaj, kiuj pasas kun indiferenta rigardo. Plej li malamas tiun stultegan kompaton, kiu kvazaŭ faras lin kaj lian kriplaĵon sinonimaj ideoj. Lia kriplaĵo estas al li mem tiel fremda kaj antipatia kiel al aliaj, ĝi ofendas liajn proprajn estetajn sentojn same multe, eble pli, ol iliajn, ĝi tute ne estas al li ĉiama zorginfano, kiun li dorlotas kaj priploras, li malamas ĝin kaj neniam faras ĝin sia propra.

La siringoj de Humlegården ŝvelis kaj bonodoris — li sidis sur benko en malproksima angulo de la parko; la infanoj sin ĉasadis, kelkfoje ankaŭ ĉirkaŭ lia benko, homoj venis kaj iris kaj ĉion li vidis kaj tamen ne vidis. Ĉi tio estis al li la plej malfacila tempo. Li estas homo, kaj li ne povas foranalizi sian homecon, ne per rezignacio mortigi ĝin, tie ĝi estas kaj trude postulas la neebulon, feliĉon. Aŭ almenaŭ pacon.

Juna sinjorino venis kun sia filineto kaj sidiĝs sur lia benko. Li pretere konstatis, ke la patrino estas bela kaj

bonvestita, kaj ke la infano, kiu eble povas esti ĉirkaŭ kvarjara, estas neordinare bela infano, kaj li demandis sin, kial la patrino ne preferas preni lokon inter aliaj fieraj patrinoj en la sunlumo ĉe la sabloludejoj. Li denove profundigis en siaj propraj pensoj, sed post kelkaj momentoj lin kvazaŭ vekis la silento. Li rigardis flanken: la patrino kaj la infano sidas tie ankoraŭ, la infano sin apogas kontraŭ la brako de la patrino kaj tiu karesas ŝiajn harojn, la ĉapelo kuŝas sur la benko. Kiam li pli detale rigardas la infanon, subite malkaŝiĝas al li io, kio donas al li preskaŭ sensacion: la infano estas idioto. En la sama momento li sentas, ke la patrino esploreme rigardas lin, kio evidente havas rezulton favoran al li, ĉar ĝuste tiam ŝi leviĝas kaj alparolas lin.

—Sinjoro, ĉu mi kuraĝas ĝeni vin per tio, ke vi gardu mian filinon dum kelkaj momentoj. Mi vidas, ke ŝi perdis sian malgrandan medalionon, sed ŝi havis ĝin antaŭ momento, kaj mi kredas, ke mi povos trovi ĝin, se mi reiros la vojon, de kiu ni venis, — kaj ŝi montris al la irejo, kiu kuŝis sufiĉe senhoma por tia supozo. Sed Anne-Marie estas laca kaj bezonas iomete da ripozo, antaŭ ol ni iros hejmen.

Li levis sian ĉapelon kaj riverencis konsente. La patrino foriris, sed la knabino montris neniun signon de maltrankvilo. Ŝi estis laca. Kiam ŝi estis laca, ŝi estis kutimi-

gita grimpi sur ies genuojn. Ĉu tiu estas fremdulo aŭ parenco, nur la hazardo decidas, sekve ĉi tiun fojon estas tiuj de la ĝibulo. Li lasis ŝin fari tion, timante, ke alie ŝi povus foriri. Ŝi apogis la kapon al lia brako kaj suprenrigardis en lian vizaĝon. Estis du belaj senenhavaj okuloj, kiuj renkontis liajn. Tiel senenhavaj kaj malĝojaj, ke li fermis siajn proprajn. Ne kompaton li sentis nek la malnovan indignon kontraŭ sia propra sorto — sed profundan korpremon antaŭ la subsento de ĉia silenta mizero kaj angoro inter la kreitaĵoj.

Iom post iom vekiĝis en li forta sento de solidareco por la infano, kiu kuŝis en liaj brakoj. Anne-Marie kun sia bela korpo kaj sia dolĉa vizaĝo estas tiel senespere malriĉa kiel li mem kun sia inteligento, kiu povus sufiĉi por ili ambaŭ. Oni estas same senfeliĉa, ĉu io mankas al la korpo, ĉu io al la animo. Nek li nek Anne-Marie travivos la amon, neniu el ili tenos propran infaneton en siaj brakoj.

Per siaj manoj li karesis la harojn kaj la vizaĝon de Anne-Marie. Estas la unua fojo, ke tiuj fortaj kaj belaj viraj manoj karesas homon kun impulsa amemo. Tamen ne, eĉ nun ne homon! Apenaŭ beston — la bestoj vivas laŭ siaj sanaj kaj sekuraj leĝoj, sed la vivo de Anne-Marie estas la plej kruela hazardo, ŝi neniam lernos fari diferencon inter amiko kaj malamiko nek inter homoj kaj

bestoj. Mankas al ŝi la plej simpla kondiĉo por la batalo de la ekzisto. La sola graco estas la profundo de ŝia mizero. Ŝi eĉ ne kapablas suferi. Sed tiu graco estas la plej granda krom la morto.

La patrino trovis la medalionon kaj revenis.

—Pardonu, ŝi diris, kiam ŝi ekvidis Anne-Marie sur liaj genuoj, kaj deprenis ŝin, eble mia knabino ĝenis vin?

—Ne, tute ne! Kaj li aldonis kun rideto: Anne-Marie kaj mi komprenas unu la alian.

La patrino etendis al li sian manon kaj ridetis:

—Dankon, mi kredas, ke ankaŭ ni du komprenas unu la alian.

En ŝiaj okuloj kuŝis nekuracebla malĝojo. Ŝi kaptis al Anne-Marie la manon, klinis la kapon kaj foriris. Li restis en la parko ankoraŭ longe post kiam malaperis de ili la lasta videto. Li sidis tie, ĝis la krepusko komencis mallumiĝi kaj ĉiuj infanoj estis for kaj nur trapasis tie iu aŭ alia enamiĝinta junulo kun sia amatino en firma brak-en-brako. Li pensis pri la patrino de Anne-Marie kaj li ĝojis, ke li nenion scias pri ŝiaj edzo, hejmo kaj servistoj kaj pri tio, kio povus profani la memoron pri ŝiaj malĝojaj okuloj. Li memoris ŝian rideton . . . La sufero en si mem estas nenio granda kaj sublimes, li pensis, estas nur nia rideto, kiu faras ĝin granda kaj sublimes. Kiam li vespere staris sur sia balkono kaj rigardis supren al la ĉie-

lo kaj sur la urbon, por la unua fojo li sentis sin pli proksima al la lumoj en la homaj loĝejoj ol al la steloj de la ĉielo.

Gertrud Lilja

*Tradukis el la sveda lingvo studrondo,
konsistanta el Signe Boye, Berta Ewert,
Anna Henriksson, Naëmi Johannesson,
Inga Kristoffersson kaj Elisabet Olsson,
sub la gvido de Birger Gerdman*

Katarino kaj Katjo

Estis suna printempa mateno, kiam princino Katarino antaŭenŝovis sian blondan kapon el la punkturtenoj de la lito, tiel ke Katjo kun du longaj nigraj silkaj gantoj sur la littapiŝo genufleksis. La princino mirege rigardis ŝin dum kelka tempo.

”Kion vi volas fari, Katjo?”

”La ŝtrumpoj, princina Moŝto.”

”Infano, mi ja ne estas simio, por havi gantojn sur la piedoj . . .”

Nur nun rimarkis Katjo la malagrablan eraron. Ŝi ruĝiĝis profunde kaj subite ŝi lasis la kapon fali sur la litorandon kaj komencis maldolĉege plori.

La princino, tute timigita pro tiu subita ekfluo de larmoj, provis ŝin kvietigi.

”Nu, ne ploru, mia kara, se vi absolute volas, mi povas surmeti ankaŭ la gantojn.”

Kvankam Katjo faris ĉiujn intimajn servojn de ĉambristino al la princino, oni ŝin tamen ne povis rigardi kiel

servistinon. Ŝi efektive okupis tute esceptan lokon ĉe la princa kortego. Jam antaŭ dek jaroj ŝi venis al la kortego, kiam ŝia patro, malriĉa ministro, trovis la morton en minejo kun tridek kunuloj. La sciigo pri la malfeliĉo tiam ankaŭ en la princa kastelo elvokis multan funebron kaj kompaton, kaj la malgranda princino Katarino, sekvante la voĉon de sia bona koro, prenis ŝin kiel unu el la post-restantaj minist-orfinoj kiel ludkunulinon. El ludkunulino fariĝis pli poste ĉambristino, kaj la ĉambristino plenumis siajn devojn kun plej granda akurateco, ĝis tiu ĉi momento, kiam ŝi absolute volis enŝovi la belajn piedetojn de la princino en gantojn.

De ĉi tiu tago montriĝis en Katjo tute strangaj simptomoj de distreco. Sufiĉos citi nur unu el multaj. La princino volis iam malsupreniri en la parkon kaj resendis Katjon de la ŝtuparo por serĉi ŝian japanan sunombrelon. La princina Moŝto atendis plenan kvaronhoron sur la ŝtuparo, ĉe la piedoj de iom nesufiĉe vestita sabloŝtona Herkulo. Fine la societo de la duondio fariĝis enua al ŝi, kaj ŝi ekiris por serĉi Katjon. Ŝi trovis ŝin sur la balkono de la blanka salono, kie ŝi kun ruĝega vizaĝo atentege rigardis al sudo kaj samtempe per la japana sunombrelo faris signojn kontraŭ la malnova fagarbaro, kiu fermis la parkon sur tiu flanko.

Kiam la princino kviete metis la manon sur ŝian ŝultron, ŝi — ĝis morto ektimigita — ektemis kaj — kiel ĉiam — ekploris. Kaj al ĉiu demando de la princino respondis nur nova larmfluo.

La solvo de ĉi tiu problemo baldaŭ estis trovita. Kiam la princino duonan horon pli poste promenis en la parko, venis renkonte al ŝi juna viro en ĉasistvesto. La princino jam miregis, ke fremdulo ĉirkaŭiras en la ĝardeno, ŝi plie miregis, kiam tiu ĉi, kun la ĉapelo en la mano, paŝis kontraŭ ŝi kaj pala kiel kreto balbutis:

”Principina Moŝto! Principina Moŝto!”

”Kion vi volas?”

El la konfuza parolado de la fremdulo ŝi povis ekscii, ke li estas nomata Ŝandor Farkaŝ, estas ”arbarpraktikanto” en princa servado, ke li amas Katjon kaj ke Katjo lin ankaŭ amas, kaj ke li pro tio spionis la principinan Moŝton dum ŝia matenpromenado, por peti de ŝi la manon de Katjo . . .

Kiam la princino poste al Katjo rakontis tiun aferon, ŝi faris al ŝi riproĉon: ”Pro kio vi nenion diris pri tio?”

”Li volis, ke ankaŭ mi parolu, sed mi diris, ke mi preferus morti . . .”

”Kaj se mi vin ne forlasos?”

”Ho, principina Moŝto, tiam mi mortos tuj.”

Kaj Katjo komencis — fidela al sia plej nova kutimo — ploregi. Ankaŭ al la princino estis la larmoj proksimaj. Ŝian koron premegis veraj patrinaj zorgoj.

”Ĉu li almenaŭ estas brava homo, tiu . . . nu, kiel li estas nomata?”

”Ho princina Moŝto, ĉu vi ne vidis lian vizaĝon?”

”Jes, vi estas prava, Katjo, li devas esti bravo homo . . . Li havas tiel sincerajn bluajn okulojn kaj altan frunton, ho, mi lin bone rigardis.”

Dum la vespermanĝo ŝi kondukis la konversacion singardeme al la edziniĝo de Katjo, kaj ĉar oni la proponon, kiun ŝi faris, en pli alta loko favore alprenis, ŝi rapidis feliĉega al sia ĉambristino.

”Katjo, plej amata Katjo! Vi ricevos vian Ŝandor-on! Mi parolis kun paĉjo, ĉio estas en ordo. Paĉjo lin konas kaj diras, ke li estas brava vireto . . . Lia patro estis eĉ dekoraciita en la militistaro . . . Pri la dota vestaĵaro mi jam zorgos.”

Katjo restis tute senparola pri tiom da feliĉo kaj nur kisis senĉese la manon de Katarino. Poste ili babiladis en la malgranda salono ankoraŭ longe post noktmezo. La lampojn en la lustro ili estingis, kaj nur en la vitrokadro de la venecia spegulo brilis la elektraĵoj, kies dolĉa brilo tra la puntaj kurtenoj kreis plej intiman duonlumon. Katarino, envolvita en blanka dormrobo, kuŝis

sur malalta divano, kaj Katjo sidis sur la dika tapiŝo je ŝiaj piedoj.

”Diru do, Katjo, ĉu vi lin vere tiel forte amas?”

”Ho, treege!”

”Diru al mi, kiel estas, kiam homo estas enamiĝinta?”

”Ho, Dio mia, tiel mirege . . . Oni devas ĉiam nur pensi pri li, kaj tiam oni ofte sentas dolĉan kapturon . . . kaj nokte oni ne povas dormi . . . Estas tiel malĝoja feliĉego, ke oni preskaŭ dezirus plori en sia ĝojo . . .”

”Kaj kiam vi konatiĝis kun li? Kiel li komencis? Mi volas ĉion scii! Rakontu!”

Katjo rakontis ĉion. Dum arbarekskurso ili ekkonatiĝis, poste ŝi lin vidis ĉe la balo de la arbar-oficistoj, pli poste ili renkontiĝis en ĝardeno aŭ en arbaro . . .

”Ĉu vi skribis unu al la alia?”

”Kompreneble, ofte!”

”Amleterojn?”

”Certe — amleterojn!”

La princino iom pripensis; poste ŝi diris mallaŭte: ”Katjo, aŭdu, nun mi volas demandi vin pri io tre grava, sed vi ne trograndigu . . . diru, ĉu li vin kisis?”

Katjo premis mute la manon de Katarino al siaj lipoj. La princino kliniĝis kun brilaj okuloj al ŝi malsupren.

”Vi devas ĉion diri al mi! Ĉu li vin kisis?”

La dolĉa mallumo donis al Katjo kuraĝon. Ŝi konfesis ĉion. Ili kisis sin reciproke — unufoje, dekfoje, centfoje — kiu do povis kalkuli! En ĝardeno, en la arbaro . . .

La du knabinoj ankoraŭ longe sidis kune, mute kaj senmove premitaj unu al la alia. La koloraj rozoj de la spegulo brilis sekretplene, ne povante trapenetri la mallumon. Katjo estis kvazaŭ ebria de sia feliĉo, kaj Katarino sentis ion, kvazaŭ dolĉan, melankolian antaŭsenton.

Du jaroj de tiam forpasis.

La sinjoro ĉefĉasisto Ŝandor Farkaŝ estis kolerinta la tutan tagon ekstere kontraŭ la lignoŝtelistoj, kaj kiam li nun vespere hejmenvenis, li estis, kiel li diris, laca kiel hundo kaj malsata kiel lupu. Katjo, kiu dume estis fariĝinta bele ronda, venis al li renkonte en nova, pura domrobo.

”Sapristi’, kiel eleganta vi estas hodiaŭ!” diris Ŝandor, kisante ŝian blankan kolon.

Katjo akceptis la intimaĵojn de sia edzo kun nobla retenado.

”La princina Moŝto estis posttagmeze ĉi tie,” ŝi poste diris.

”Tondro!” li miregis. ”Pro tio vi do tiel ornamis vin?”

”Ŝi volis ankoraŭ unu fojon kisi sian baptinganon kaj adiaŭi min. Pripensu nur, ŝi kisis ankaŭ min.”

”Estas domaĝe, ke mi ne estis tie ĉi. Se ŝi estis tiel kisesma — kiu scias, eble ankaŭ al mi estus veninta io . . .”

Katjo, kiu estis edukita ĉe kortego, aŭskultis sian edzon kun lojala indigno.

”Vi vere estas tre malrespekta.”

La ĉefĉasisto dume ĵetis sin en grandan apogseĝon kaj sidigis nun Katjon per unu ekpuŝo sur siajn genuojn.

”Kaj pro kio do la princina Moŝto adiaŭis?”

Katjo jam tute fordonis sian noblan sintenadon kaj eksidis komforte sur la genuoj de sia edzo.

”Venontan semajnon ŝi veturos al la restadejo . . . Tie okazos ja la edziĝfestoj kun princo Fridoleno . . .”

”Ŝi do tamen prenos la princon! Antaŭ duona jaro oni jam parolis, ke la fianĉiĝo estis rompita . . .”

”Malsaĝa babilado! Kiel ĝi estus rompita? Okazis nur malhelpoj, kiujn oni devis forigi.”

La malgranda virino denove fariĝis babilema kaj rakontis, kion ŝi sciis.

”La princo havis amatinon, kantistinon. Pasintan jaron li promesis al siaj gepatroj, ke li rompos kun ŝi, kaj venis poste ĉi tien, por peti la manon de princino Katarino . . . Sed hejme li denove pripensis kaj returnis sin al sia kantistino . . . Okazis tiam furiozaj scenoj inter la princo kaj lia patro, sed la bona Fridoleno obstinis kaj nenion volis scii pri sia fianĉino. La du kortegoj pro tio

decidis prokrasti la geedziĝon ĝis nedifinita tempo, ĝis kiam la princo estos teda je sia amatino . . . Tio ŝajnas nun esti la okazo . . .”

”Kaj ĉu nia princino konas ĉi tiun historion?”

”Ĉiuokaze, se eĉ mi ĝin konas; kaj ankaŭ la ĵurnaloj skribis pri tio . . .”

”Kaj malgraŭ tio ŝi prenas la princon?”

”Amiketo, vi vere estas iom malsaĝa! Ĉu vi kredas, ke ĉe princoj tio ankaŭ iras same, ke oni antaŭe enamiĝas kaj poste edziĝas? Princo Fridoleno estas de reĝa sango kaj staras en parenceco kun kvar grandpotencoj . . .”

La ĉefĉasisto iom pripensis.

”Kiel do aspektas princo Fridoleno?”

”Pasintan jaron amaso da grandaj sinjoroj ĉasis ĉi tie . . . Estis unu inter ili, tiu malgranda blondulo, kun ekstreme malsaĝa vizaĝo, kiu ĉiam unu cigaredon post alia ekbruligis . . . Lia kapo moviĝis tiel ridinde, kvazaŭ li havus koreon . . .”

”Jes, jes, tiu li estas!” diris Katjo.

”Kaj al tiu oni donas nian principinon, ĉi tiun rozfloron?”

Katjo ne respondis.

”Kion diris la princino al nia etulo?” poste demandis Ŝandor.

”Kiam ŝi lin kisis, ŝiaj okuloj estis plenaj de larmoj. Ŝi diris: ”Ankaŭ mian baptinginfanon mi ne vidos plu!” Mi

volis gajigi ŝin kaj parolis pri ŝia nova restadejo . . .” Jes, la urbo estas bela,” diris la princino, ”nur ofte nebula, kaj faras teruran timon al mi la nebulo! Faras teruran timon al mi . . .”

La malgranda virino premis sin pli proksime al sia edzo, kaj sur ŝia vizaĝo brilis la kvieta ĝojo pro tio, ke ŝi ne venis en la mondon kiel princino.

Ferenc Herczeg

El "Hungaraj rakontoj"

El la hungara tradukis A. Panajott

La fontano de juneco

Tiu tre stranga viro, la maljuna doktoro Heidegger, foje invitis kvar aĝajn amikojn por kunveni kun li en lia studejo. Estis tri blankbarbaj viroj kaj velkinta sinjorino, kies nomo estis vidvino Wycherley. Ili ĉiuj estis melankoliaj, maljunaj estaĵoj, kiuj estis estintaj malfeliĉaj en la vivo, kaj al kiuj la plej granda malfeliĉo estis, ke ili ne estis plu longe for de tombo. Sinjoro Melbourne estis en sia plej matura aĝo prospera komercisto, sed perdis la tutan havaĵon per freneza spekulacio, kaj nun estis apenaŭ pli bona ol almozulo. Kolonelo Killigrew malŝparis siajn plej bonajn jarojn, ankaŭ siajn sanon kaj posedaĵojn, sekvante plezuretojn, kiuj naskis aron da doloroj, kiel podagron kaj diversajn aliajn turmentojn de animo kaj korpo. Sinjoro Gascoigne estis ruinigita politikisto, viro malbonfama, aŭ almenaŭ estis tia, ĝis la tempo lin malaperigis el la kono de la nuna generacio kaj igis lin nekonata anstataŭ malglora. Kiom koncernas vidvinon Wycherley, la tradicio diras al ni, ke ŝi estis glora belulino en sia junaĝo; tamen jam de longe ŝi vivis en

profunda izoleco pro certaj skandalaj historioj, kiuj influis kontraŭ ŝin la sinjoraron de la urho. Estas menciinda cirkonstanco, ke ĉiu el ĉi tiuj tri maljunaj sinjoroj estis frua amanto de vidvino Wycherley, kaj iam ili estis tranĉontaj al si reciproke la gorgon pro ŝi. Kaj antaŭ ol ni pluiras, ni nur sugestetu, ke doktoro Heidegger kaj ĉiuj liaj kvar gastoj estis kelkfoje konsiderataj iom frenezetaj, kiel ne malofte okazas rilate al maljunaj homoj ĝenataj aŭ de nunaj zorgoj aŭ de doloraj rememoroj.

—Karaj malnovaj amikoj, — diris doktoro Heidegger, signante per manmovo, ke ili sidiĝu, — mi deziras vian helpon por unu el tiuj malgravaj eksperimentoj, per kiuj mi min distras ĉi tie en mia studejo.

Se ĉiuj historioj estis veraj, la studejo de doktoro Heidegger estis tre stranga ejo. Ĝi estis malhela, malmoderna ĉambro, festonita de araneaĵoj, kaj aspergita de antikva polvo. Ĉirkaŭ la muroj staris kelkaj kverkaj libroj, plenaj de libroj de ĉiuj specoj kaj grandoj. Super la meza libro troviĝis bronza busto de Hipokrato, kiun, laŭ iuj autoritatuloj, doktoro Heidegger kutimis konsulti pri ĉiuj malfacilaj malsanoj de sia klientaro. En la plej malluma angulo de la ĉambro staris alta kaj mallarĝa kverka ŝranko, kun la pordo malfermita, en kiu malklare vidiĝis skeleto. Inter du el la libroj pendis spegulo, prezentanta sian altan kaj polvan platon interne de malbriliĝinta orumita kadro. Inter la multaj mirindaj historioj rakontitaj

pri tiu spegulo, oni fabelis, ke la spiritoj de ĉiuj mortintaj pacientoj de la doktoro loĝas en ĝia rando kaj rigardas en lian vizaĝon, kiam ajn li tien rigardis. La kontraŭan flankon de la ĉambro ornamis plengranda portreto de junulino, vestita per velkinta grandiozeco de silko, atlaso kaj galono, kaj kun vizaĝo same velkinta, kiel la vestaĵoj. Antaŭ pli ol duonjarcento doktoro Heidegger estis ĵus edziĝonta kun ĉi tiu junulino, sed iomete malsaniĝinte, ŝi glutis unu el la preskriboj de sia amanto kaj mortis en la vespero antaŭ la edziniĝo.

La plej grandan kuriozaĵon de la studejo oni devas ankoraŭ mencii; tio estis pezega volumo, bindita per nigra ledto, kun masivaj arĝentaj agrafoj. Ne estis literoj sur la kovriloj, kaj neniu povis malkovri la titolon de la libro. Sed ĝi estis bone konata kiel libro pri magio; kaj iun fojon, kiam la ĉambristino estis ĝin levinta, nur por forviŝi la polvon, la skeleto klakis en sia ŝranko, la bildo de la junulino metis unu piedon sur la plankon kaj kelkaj kadavraj vizaĝoj kaŝe rigardis el la spegulo; dum la bronza kapo de Hipokrato malsereniĝis kaj diris: "Detenu!" Tia estis la studejo de doktoro Heidegger.

En la somera posttagmezo de nia rakonto, malgranda ronda tablo, nigra kiel ebono, staris en la centro, portante vazon el kvarcvitro kaj de belega formo kaj komplika prilaboro. La sunbrilo envenis tra la fenestro, inter la pezaj festonoj de du velkintaj damaskaj kurtenoj, kaj

falis rekte trans ĉi tiun vazon, tiel ke milda brilo respuguliĝis el ĝi sur la cindrokolorajn vizaĝojn de la kvin gemaljunuloj, kiuj ĉirkaŭsidis. Ankaŭ kvar ĉampanaj glaŝoj estis sur la tablo.

—Karaj malnovaj amikoj, — ripetis doktoro Heidegger ĉu mi povas fidi pri via kunhelpo por fari ege strangan eksperimenton?

Nu, doktoro Heidegger estis tre stranga maljunulo, kies strangaĵoj jam fariĝis kerno por mil fantaziaj historioj. Kiam la kvar gastoj de la doktoro aŭdis lin paroli pri siaj proponataj eksperimentoj, ili atendis nenion pli mirindan ol mortigon de muso en aerpumpilo, aŭ esploron de araneaĵo per mikroskopo, aŭ ian similan sensencaĵon, per kiu li kutimis turmenti siajn intimulojn. Sed ne atendente respondon, doktoro Heidegger lamiris tra la ĉambro kaj revenis kun la granda pezega volumo bindita per nigra led, pri kiu la famo asertis, ke ĝi estas libro pri magio. Malfiksinte la arĝentajn agrafojn, li malfermis la volumon kaj prenis el inter ĝiaj paĝoj rozon, aŭ ion, kio iam estis rozo, kvankam jam la verdaj folioj kaj puncaj petaloj alprenis komunan brunetan koloron, kaj la antikva floro ŝajnis preta polviĝi en la manoj de la doktoro.

—Ĉi tiu rozo, — diris doktoro Heidegger kun ĝemspiro, — ĉi tiu sama velkinta kaj dispecetiĝanta floro ekfloris antaŭ kvindek kvin jaroj. Ĝin donis al mi Sylvia Ward, kies portreto tie pendas; kaj mi intencis porti ĝin ĉe nia

edziĝofesto. Kvindek kvin jarojn ĝi estas trezorigita inter la paĝoj de ĉi tiu malnova libro. Nu, ĉu vi opinias, ke estas eble, ke ĉi tiu rozo post duonjarcento povus iam flori denove?

—Sensencaĵo! — diris vidvino Wycherley kun plendema kapskuo. — Vi povus same bone demandi, ĉu sulkiĝinta vizaĝo de maljunulino povos iam flori denove.

—Rigardu! — respondis doktoro Heidegger. Li malkovris la vazon, kaj ĵetis la velkintan rozon en la akvon, kiun ĝi enhavis.

Unue ĝi kuŝis malpeze sur la supro de la fluidaĵo, ŝajne ensuĉante neniom da ĝia malsekeco. Baldaŭ tamen stranga ŝanĝiĝo vidiĝis. La premitaj kaj sekigitaj petaloj ekmoviĝis, kaj alprenis viviĝantan puncnuancon, kvazaŭ la floro reviviĝus el mortsimila dormo, kaj la maldikaj trunketo kaj branĉetoj de la foliaro fariĝis verdaj, kaj jen estis la rozo de duonjarcento aspektanta same freŝa, kiel kiam Sylvia Ward ĝin la unuan fojon donis al sia amanto. Ĝi estis apenaŭ plenkreska; ĉar iuj el ĝiaj delikataj ruĝaj petaloj modeste volviĝis ĉirkaŭ ĝia malseka sino, en kiu brilis du-tri roseroj.

—Tio estas ja tre beleta trompo,— diris la amikoj de la doktoro; tamen indiferente, ĉar ili jam vidis pli grandajn miraklojn ĉe iluziista prezentado. — Bonvolu diri, kiel tio efektiviĝis?

—Ĉu vi iam aŭdis pri la Fontano de Juneco? — demandis doktoro Heidegger, — kiun Ponce de Leon, la hispana aventuristo, serĉis antaŭ du-tri jarcentoj?

—Sed ĉu ĝin Ponce de Leon iam trovis? — diris vidvino Wycherley.

—Ne, — respondis doktoro Heidegger, — ĉar li ĝin neniam serĉis en la ĝusta loko. La konata Fontano de Juneco, se oni min ĝuste informis, troviĝas en la suda parto de la Florida duoninsulo, ne malproksime de la lago Makako. Ĝian fonton superombas kelkaj gigantaj magnolioj, kiuj, kvankam ili havas la aĝon de sennombraj jarcentoj, restas freŝaj kiel violoj, pro la ecoj de ĉi tiu mirinda akvo. Konato mia, konante mian scivolemon pri tiaj aferoj, sendis al mi tion, kion vi vidas en ĉi tiu vazo.

—Aĥem! — diris kolonelo Killigrew, kiu kredis eĉ ne unu vorton de la rakonto de la doktoro. — Kaj kio povas esti la efiko de ĉi tiu fluidaĵo al la homa korpo?

—Juĝu por vi mem, kolonelo mia, — respondis doktoro Heidegger, — kaj al vi ĉiuj, miaj estimataj amikoj, mi donos tiom da ĉi tiu mirinda fluidaĵo, kiom povas redoni al vi la freŝecon de juneco. Miaparte, multe suferinte dum mi maljuniĝis, mi ne urĝas fariĝi denove juna. Do, kun via permeso mi nur observos la progreson de la eksperimento.

Dum doktoro Heidegger parolis, li plenigis la kvar ĉampanajn glasojn per la akvo de la Fontano de Juneco.

Ĝi ŝajnis estis saturita de eferveska gaso, ĉar malgrandaj aervezikoj senĉese surpréniris de la fundo de la glasoj kaj ŝprucis en arĝentecan akveraron ĉe la supro. Ĉar la likvaĵo difuzigis agrablan odoron, la maljunaj homoj ne dubis, ke ĝi posedas likvorajn kaj konsolantajn ecojn; kaj kvankam tute skeptikaj pri ĝiaj rejunigantaj ecoj, ili sentis deziron ĝin tuj engluti. Sed doktoro Heidegger petis ilin, ke ili atendu dum momento.

—Antaŭ ol vi trinkos, miaj respektindaj maljunaj amikoj, — li diris — estus bone, se vi, kun la vivdaŭra sperto por vin gvidi, kompilus kelkajn ĝeneralajn regulojn por via gvido, dum vi pasos la duan fojon tra la danĝeroj de juneco. Konsideru, kia peko kaj honto estus, se vi, kun viaj apartaj avantaĝoj, ne fariĝus modeloj de virto kaj saĝo por ĉiuj junaj homoj de la epoko!

La kvar aĝaj amikoj de la doktoro ne respondis al li, krom per malforta kaj tremanta rido; tiel ridindega estis la ideo, ke, sciante kiel proksime pento marŝas post la paŝoj de eraro, ili iam ree devojiros.

—Trinku do, — diris la doktoro, sin klinante. — Mi ĝojas, ke mi tiel bone elektis la subjektojn de mia eksperimento.

Per paralizitaj manoj ili levis la glasojn al la lipoj. La likvoron, se ĝi vere posedis tiajn ecojn, kiajn doktoro Heidegger al ĝi atribuis, oni ne povus donaci al kvar homoj, kiuj pro mizero ĝin pli bezonis. Ili aspektis, kvazaŭ

ili neniam estus sciintaj, kio estas juneco aŭ plezuro, kvazaŭ ili estus idoj de maljuneco, de Naturo, kaj ĉiam same grizaj, kadukaj, sensukaj, mizeraj estaĵoj, kiuj nun sidis kurbiĝintaj ĉirkaŭ la tablo de la doktoro, sen sufiĉe da vivo en siaj animoj aŭ korpoj por esti vigligataj eĉ de la espero rejuniĝi. Ili eltrinkis la akvon kaj remetis siajn glasojn sur la tablon. Sendube vidiĝis preskaŭ tuja pliboniĝo en la aspekto de la grupo, ne malsimila al tio, kion eble farus glaso da riĉa vino, kune kun subita lumo de gajiga sunbrilo, tuj heliĝanta super iliaj vizaĝoj. Troviĝis sana ruĝeco sur iliaj vangoj, anstataŭ la cindra nunco, kiu igis ilin aspekti tiel kadavraj. Ili rigardis unu la alian kaj imagis, ke iu magia potenco jam komencis forglatigi la profundajn kaj malĝojajn surskribojn, kiujn Patro Tempo tiel longe gravuradis sur iliaj fruntoj. Vidvino Wycherley alĝustigis sian kufon, ĉar ŝi sin sentis denove preskaŭ kiel virino.

—Donu al ni pli da ĉi tiu mirinda akvo! — ili kriis avide — Ni estas malpli maljunaj, sed ni estas ankoraŭ tro maljunaj! Rapidu, donu al ni pli!

—Paciencon, paciencon! — diris doktoro Heidegger, kiu sidis observante la eksperimenton kun filozofa aplombo. — Vi maljuniĝis en la daŭro de longa tempo; vi certe devus esti kontentaj juniĝi en duonhoro! Tamen la akvo estas por via uzo.

Denove li plenigis iliajn glasojn per la akvo de juneco, kaj sufiĉe el ĝi restis en la vazo por rejunigi duonon de la maljunuloj en la urbo ĝis la aĝo de iliaj propraj nepoj. Dum la aervezikoj ankoraŭ brilis sur la rando, la kvar gastoj de la doktoro kaptis siajn glasojn de la tablo kaj enstomakigis la enhavon per unu gluto. Ĉu estis trompo? Jam dum la trinko pasis malsupren tra ilia gorgo, ĝi ŝajnis okazigi ŝanĝojn en ilia tuta korpo. Iliaj okuloj fariĝis klaraj kaj helaj; brila nuanco pliiĝis inter iliaj arĝenteaj bukloj; ili sidis ĉirkaŭ la tablo, tri sinjoroj de matura aĝo kaj virino apenaŭ ekster sia vigla matureco.

—Mia kara vidvino, vi estas ĉarma! — kriis kolonelo Killigrew, kies okuloj fikse rigardis ŝian vizaĝon, dum la ombroj de maljuneco flugetis for de ĝi kiel la mallumo for de la punca matenruĝo. La bela vidvino sciis de longe, ke la komplimentoj de kolonelo Killigrew ne ĉiam sekvas la seriozan veron; do ŝi stariĝis kaj kuris al la spegulo, ankoraŭ timante, ke malbela vizaĝo de maljunulino renkontos ŝian rigardon. Intertempe la tri sinjoroj kondukis tiel, ke pruviĝis, ke la akvo de la Fontano de Juneco posedis ŝajnebriigajn ecojn; se vere la vigleco de ilia animo ne estis nur delireta kapturiniĝo kaŭzita de la subita forigo de la pezeco de la jaroj.

La menso de sinjoro Gascoigne ŝajnis sin okupi pri politikaj aferoj, sed ĉu rilate al la pasinteco, aŭ al la nuntempo, aŭ estonteco, tion oni ne facile povis determini,

ĉar la samaj ideoj kaj frazoj estas laŭmodaj de antaŭ kvindek jaroj. Jen li klakis plengorĝajn frazojn pri patriotismo, nacia gloro, kaj la rajto de la popolo; jen li murmuris ian aŭ alian danĝeran sensencaĵon, per ruza kaj dubema flustro, tiel singardeme, ke eĉ la propra konscienco apenaŭ povis kapti la sekreton; kaj jen li parolis per regulaj akcentoj kaj per tono profunde respekta, kvazaŭ reĝa orelo aŭskultus liajn poluritajn frazojn. Kolonelo Killigrew dum tiu tuta tempo kantis gajan batalkanton, kaj sonorigis sian glason akorde kun la rekantaĵo, dum liaj okuloj vagis al la diketa formo de vidvino Wycherley. Ĉe la transa flanko de la tablo sinjoro Melbourne implikiĝis en kalkulo de dolaroj kaj cendoj, kun kiu strange intermiksiĝis projekto por provizi al la Orientaj Hindioj glacieron per jungado de balenaro al la polusaj glacimasoj. Kiom koncernas la vidvinon, ŝi staris antaŭ la spegulo riverencante kaj afekte ridetante al la propra bildo, kaj ĝin salutante kiel amikon, kiun ŝi amas pli ol la tutan ceteran mondon. Ŝi puŝis la vizaĝon proksimen al la spegulo por vidi, ĉu iu bone memorita sulketo aŭ "korvpiedo" vere malaperis. Ŝi ekzamenis por sciiĝi, ĉu la neĝo jam tiel tute degelis el ŝiaj haroj, ke la malnova ĉapo povas esti konvene flankenĵetota. Fine, sin turninte vigele, ŝi alproksimiĝis, marŝante kvazaŭ dancante al la tablo.

—Mia kara maljuna doktoro — ŝi kriis — bonvolu doni al mi ankoraŭ glason!

—Certe, mia kara sinjorino, certe! — respondis la doktoro. — Vidu ! Jam mi plenigis la glasojn.

Tie efektive staris la kvar glasoj, plenplenaj de ĉi tiu mirinda akvo, kies delikata aspergaĵo, dum ĝi eferveskis de la supraĵo, similis al tremanta brilo de diamantoj. Estis nun tiel proksime al sunsubiro, ke la ĉambro jam fariĝis pli malluma ol antaŭe; sed milda kaj lunsimila brilo brilis de interne de la vazo kaj restis egale sur la kvar gastoj kaj la maljuna figuro de la doktoro. Li sidis en alt-dorsa, komplike skulptita kverka brakseĝo, kun aspekto grize digna, kiu ja povus bone konveni al tiu Patro Tempo mem, kies potenco neniam estis disputita, escepte de ĉi tiu bonŝanca ĉeestantaro. Eĉ trinkinte la trian trinkon de la Fontano de Juneco, ili estis preskaŭ timfrapitaj de la esprimo de lia mistera vizaĝo. Sed la sekvan-tan momenton la vigliga kuro de juna vivo sin sentigis tra iliaj vejnoj. Ili estis nun en la feliĉa plejforto de juneco. La maljuneco, kun sia mizera sekvaĵo de zorgoj kaj bedaŭroj kaj malsanoj memoriĝis nur kiel maltrankvilo de sonĝo, el kiu ili jam ĝoje vekiĝis. La freŝa brilo de la animo, perdita tiel frue, kaj sen kiu la sinsekvaj scenoj de la mondo estis nur galerio de velkintaj bildoj, denove ĵetis sian sorĉon super ĉiujn iliajn esperojn. Ili sin sentis kiel nove kreitaj estaĵoj en nove kreita universo.

—Ni estas junaj! Ni estas junaj! — ili ekkriis ĝojege.

La juneco, same kiel la ekstremo de la maljuneco, jam forigis la farte markitajn trajtojn de la mezaĝo, kaj kunfandis ilin ĉiujn. Ili estis aro de gajaj gejunuloj, preskaŭ freneziĝintaj pro la superabunda petolemo de ilia aĝo. La plej stranga rezulto de ilia gajeco estis impulso moki malfortecon kaj kadukecon, kies viktimoj antaŭ nelonge ili estis. Ili laŭte priridis siajn elmodiĝintajn vestaĵojn, la jakojn kun la larĝaj baskoj kaj la veŝtojn kun klapoj portataj de la junuloj, kaj la malnovajn kufon kaj robon de la floranta knabino. Unu iris lamente sur la planko kiel podagra avo; alia metis okulvitrojn sur la mezon de sia nazo kaj ŝajnis studi atente la gotliterajn paĝojn de la libro pri magio; la tria sidiĝis en brakseĝo kaj penis imiti la aĝan dignecon de doktoro Heidegger. Poste ĉiuj kriis gaje, kaj ĉirkaŭsaltis en la ĉambro. Vidvino Wycherley — se oni povas nomi vidvino tiel freŝan knabinon — paŝetis al la seĝo de la doktoro kun petola gajeco sur sia roza vizaĝo.

—Doktoro, kara maljunulo! — ŝi ekkriis, — leviĝu kaj dancu kun mi!

Tiam la kvar gejunuloj ridis eĉ pli laŭte, pensante kiel strange aspektus la doktoro.

—Pardonu al mi, mi petas, — kviete respondis la doktoro, — maljuna kaj reŭmatisma mi estas, kaj por mi la dancado finiĝis antaŭ longe. Sed unu aŭ alia el ĉi tiuj gajaj junuloj estos feliĉa havi tiel belan kunulinon.

—Dancu kun mi, kara! — kriis kolonelo Killigrew .

—Ne, ne, mi volas esti ŝia kunulo! — kriis sinjoro Gascoigne.

—Antaŭ kvindek jaroj ŝi promesis la manon al mi! — kriis sinjoro Melbourne.

Ili ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ ŝi. Unu kaptis ambaŭ ŝiajn manojn kun pasia ekpreni; alia ĵetis brakon ĉirkaŭ ŝian talion; la tria metis la tutan manon inter la brilajn buklojn amasiĝintajn sub la kufo de la vidvino. Ruĝiĝante, spiregante, baraktante, riproĉante, ridante, ventumante laŭvice la vizaĝon ĉiu per sia varma spiro, ŝi penis sin liberigi, sed ŝi ankoraŭ restis en ilia triobla ĉirkaŭpreni. Neniam ekzistis pli vigla bildo de juneca rivaleco, kun sorĉa belo por premio. Tamen, per stranga trompiĝo, pro la malumo de la ĉambro kaj la malnovegaj vestaĵoj, kiujn ili ankoraŭ portis, la alta spegulo, laŭ onidiro, reflektis la figurojn de tri maljunaj, grizaj velkiĝintaj avoj ridinde baraktantaj por la maldika malbelo de ŝrumpinta avino.

Sed junaj ili estis. Ilia brulanta pasio tion pruvis. Eks-cititaj ĝis frenezigo de la koketado de la knabino-vidvino, kiu nek donis, nek tute detenis siajn favorojn, la tri rivaloj komencis interŝanĝi minacajn rigardojn.

Ankoraŭ tenante la belan premion, ili luktis furioze por preni unu la alian ĉe la gorĝo. Dum ili baraktis tien kaj reen, la tablo renversiĝis kaj la vazo frakasiĝis en mil pecojn. La valorega Akvo de Juneco fluis en brila rivereto laŭ la planko, kaj malsekigis la flugilojn de papilio,

kiu, maljuniĝinte en la finiĝanta somero, jam malsuprenleviĝis tien por morti. La insekto flugetis malpeze tra la ĉambro kaj suriĝis sur la neĝblankan kapon de doktoro Heidegger

—Jen, jen, sinjoroj! Jen, sinjorino Wycherley! — ekkriis la doktoro. — Vere mi devas protesti kontraŭ ĉi tiu tumulto.

Ili stariĝis senmovaj kaj tremis, ĉar ŝajnis, kvazaŭ la griza tempo revokus ilin el ilia suna juneco malproksimen en la malvarman kaj malluman valon de maljuneco. Ili rigardis la maljunan doktoron, kiu sidis en sia skulptita brakseĝo, tenante la rozon de duonjarcento, kiun li savis el inter la pecoj de la frakasita vazo. Laŭ lia manmovo, la kvar tumultantoj residiĝis, des pli volonte, ĉar iliaj fortaj luktoj ilin jam lacigis, kvankam ili estis junaj.

—La kompatinda rozo de mia Sylvia! — eligis doktoro Heidegger, ĝin tenante kontraŭ la lumo de la sunsubiraj nuboj. — Ŝajnas, ke ĝi denove velkas.

Kaj tiel estis. Eĉ dum la ĉeestantaro ĝin rigardis, la floro daŭre velkis, ĝis ĝi fariĝis same seka kaj rompebla, kiel kiam la doktoro la unuan fojon ĝin ĵetis en la vazon. Li forskuis la malmultajn gutetojn de malsekaĵo, kiuj kroĉiĝis al ĝiaj pelaloj.

—Tian mi ĝin amas same multe kiel en ĝia rosa freŝeco, — li diris, premante la velkintan rozon al siaj velkin-

taj lipoj. Dum li parolis, la papilio flugetis malsupren de la neĝblanka kapo de la doktoro kaj falis sur la plankon. Denove liaj gastoj tremis. Stranga malvarmo, ĉu de la korpo, ĉu de la spirito, ili ne povis diri, grade rampis super ilin ĉiujn. Ili sin rigardis reciproke kaj imagis, ke ĉiu forfluganta momento forrabas unu ĉarmon, kaj lasas profundigĝan sulketon tie, kie antaŭe estis neniuj. Ĉu tio estis iluzio? Ĉu la ŝanĝoj de unu vivo estis amasiĝintaj en tiun malgrandan tempospaĉon, kaj ĉu ili estis nun kvar maljunaj homoj, kiuj sidas kun sia maljuna amiko la doktoro?

—Ĉu tiel baldaŭ ni estas maljuniĝintaj? — ili ekkriis, malgaje.

Vere jes ja. La Akvo de Juneco posedis nur virton pli efemeran ol la virto de vino. La deliro, kiun ĝi kreis, jam forpasis. Per tremanta impulso, kiu montris, ke ŝi estas ankoraŭ virino, la vidvino interpretis siajn maldikajn manojn antaŭ la vizaĝo kaj deziris, ke la ĉerka kovrilo jam estu super ĝi, ĉar ĝi ne plu povas esti bela.

Nathaniel Hawthorne

El la angla tradukis G. Badash

La knabineto kaj la karbo

La poŝto alportis al mi tiun ĉi historion. Bonŝance la letero ne dronis dum sia longa vojaĝo en tiuj ĉi historiaj tagoj. Kiam la tuta mondo ploras, ĝemas, ruiniĝas, oni diras: "Ni vivas en historiaj tempoj" kaj ni ja povas konsoli nin, ke almenaŭ ni ne enuas.

La letero venis el neŭtrala lando. Estas indiferente, el kiu. La nomoj ja estas diversaj, sed la vizaĝo de ĉiuj landoj estas egale malgaja; la milita mizero neŭtrale kaj egale ŝutas cindron por sufoki la iamajn kolorojn de la vivo. La knabineto, pri kiu mi rakontos, vivas en antaŭurbo de eŭropa metropolo. Ne tute okjara ŝi estas. Maldika. Tiu ĉi maldikeco dependas parte de tiu, ke paĉjo kaj panjo estas ja maldikaj, parte, ke ili estas tre malriĉaj. Por ne droni en naciekonomiaj detaloj, ni ne tre analizu, kiom da procentoj de tiu ĉi svelteco ŝargas la konton de la hereda naturo kaj kiom la fakton, ke oni devas ŝpari ĉe la manĝo, por povi pagi la amortizan ŝuldon de la eta domo. Panjo ofte ĝemas: "Oni ne povas elteni, ĉio kostas tre multe." Panjo estas artistino de la

vivo, estas preskaŭ nekompreneble, kiel ŝi povas direkti la etan ŝipon de la mastrumado ĝis la feliĉa haveno de la nova monat-komenco. Tiam falas monsumo, kiel neĝoflokoj, kaj simile al ili rapide fordegelas. Cetere la metaforo ne estas tre trafa, almenaŭ ĉi jare ne, kiam la neĝoflokoj restis multe pli solidaj kaj rezistaj, ol la malgrasa salajro de paĉjo. Judit havas karbe nigrajn harojn kaj karbe nigrajn, viglajn kaj grandajn okulojn. Belaj haroj, brilaj okuloj! Ili meritas la similigon al la plej granda trezoro de la milita jaro: al la karbo. Sed unue ni parolu pri Judit. Dum niaj maloftaj renkontoj, mi lernis scii, ke la eta, vigla, rapida kaj saĝa individueto de Judit meritas atenton kaj simpatian. Estas malpli motivita ŝia simpatio al mi: mondvagabondo mi estas, alvenanta malofte al tiu parto de la tero. Antaŭ kvar jaroj ŝi vizitis min. Ŝi aspektis kiel eta glaci-ursido en sia neĝblanka t. n. urs-vesto, el kiu nur la nigraj okuloj kaj la saĝa vizaĝeto vidiĝis. Mi estis en sufiĉe mizera stato, post operacio en malsanulejo. Eta Judit serioze rigardis min, pli serioze, ol kvarjaraj knabinoj kutime rigardas. Tiutempe ŝi estis favoratino de la antaŭurbaj monaĥinoj, kies infanvartejon la knabineto vizitis. Kiam panjo kaj la knabineto forlasis min, ili atingis etan placon. Malfru-vintara tago estis, la brila neĝo transformiĝis al malvarma malpuraĵo. Krucifikso staris ĉe la placo. Panjo por momento forlasis la maneton de sia flino. Judit subite ekge-

nuis en la koto, antaŭ la krucifikso kaj preĝis jene: ”Jesuseto mia, resanigu mian kompatindan onklon”. Poste ŝi releviĝis kaj rimarkis la du terurajn kotmakulojn sur la neĝblanka urs-pantalono; time ŝi alrigardis panjon. Sed panjo estis okupata; subite io falis en ŝiajn okulojn kaj tiamaniere eta Judit liberiĝis de ĉiuj mallaŭdoj. Krome la onklo resaniĝis kaj li nun ŝatus, se eta Judit preĝus kun simila efiko por la malsana mondo.

Cetere ne kredu, ke Judit ne kutimas ricevi mallaŭdojn. Tiu estus granda eraro. Tiurilate ne nur panjo estas iom tro severa, sed ankaŭ la instruistino. Ili ja ne ĉiam punas, sed okazas ofte tamen, ke oni ricevas maljustan punon. Entute eta Judit havas en si certan ribelemon. La granduloj nur ŝajnigas, ke ili estas tiel saĝaj kaj ne-trompeblaj. Oni ofte spertas tion demandante ilin pri diversaj problemoj kaj kontraŭdiroj en la mondo; estas tute simplaj demandoj, sed anstataŭ respondi, oni abrupte sendas ŝin por alporti glason da akvo kaj do oni neniam ricevas respondon je tiaj demandoj: ”Panjo, kiu estis mia patrino, kiam vi estis fraŭlino?” Ankaŭ la milito proponas amason da demandoj pri tio, ĉu oni rajtas mortigi la malamikon? Kaj ĉu onklo Paŭlo kaj onklo Petro, kiuj iĝis civitanoj en du malamikaj landoj . . . kiel estas pri ili? Kiu estas malamiko el ili? Ĉu tiu estas malamiko, kiu atakas? Sed ĉu onklo Paŭlo, aŭ onklo Petro volus ataki unu la alian? Kaj la rezulto denove estas: unu glaso da akvo.

Cetere Judit mem ne estas militema. Se oni venos por paĉjo kaj volos soldatigi lin, ŝi kaŝos lin sub la liton kaj diros kun panjo: "Ni ne havas paĉjon, ni estas orfoj."

Ne estas mirinde, ke la granduloj ne imponas al Judit. Ŝi priparolas la aferojn prefere kun infanoj. Ili estas pli saĝaj kaj ne faras komplikaĵojn el simplaj aferoj. Estas tute strange, ke onklino Jolanda, la instruistino, plendas dirante, ke Judit malbonigas ĉiun knabinon, ĉiusemajne alia knabino estas sidigita apud ŝin kaj post tiu procedo la plej silentema kaj obeema knabino iĝas sia propra kontrasto. Sed ĉu Judit estas kulpa pri tio, ke ĉiu parolas al ŝi, ne konsiderante la fakton, ke onklino Jolanda ankaŭ havas ion por preparoli dum la lecionoj. Kaj ne sufiĉas, ke oni devas suferi punon en la lernejo, t. e. genui en la angulo de la klasĉambro — ĉiu devus kompreni, ke tio estas la plej maljusta afero — kaj anstataŭe oni venas hejmen kaj panjo diras: "Judit, ne kaŝu la genuojn, montru viajn ŝtrumpojn!" Estas vere sentakte de onklino Jolanda, genuigi ŝin sur la ole-ŝmiritan plankon kaj do nenio estas pli facila, ol konstati la aferon laŭ la oleomakuloj de la ŝtrumpoj. Kaj estas tre malfacile kredigi al panjo, ke onklino Jolanda ĉi-okaze absolute eraris; ŝi estas vere modela infano. Panjo havas alian opinion kaj Judit tediĝas de la moralpredikoj kaj serĉas kontraŭrimedojn. Dum la lasta tempo ŝi eltrovis ion; ŝi provizis sin per gazetpapero kaj kiam onklino Jolanda denove

maljuste punis ŝin, Judit — kion ŝi povus fari ? — iris en la angulon, prenis la gazetpaperon kaj sternis ĝin sub sin. La paper-susuro vekis la intereson de onklino Jolanda.

”Kion vi faras, Judit? — ŝi demandis konsternite.

”Panjo ne povas ellavi la oleon el miaj ŝtrumpoj,” respondis Judit kaj la instruistino devis akcepti tiun ĉi vidpunkton. Dum kelka tempo ĉio estis en ordo. Panjo kredis, ke ŝia kara infano mirige pliboniĝis kaj ne plu ornamas la klas-angulon. Samtempe ŝi ne volis fari grandan sensacion el la afero. Ŝi silentis do kaj same Judit. Sed iun tagon panjo aranĝis libro- kaj kajer-kontrolon kaj dume ŝi elteris ege malpuran, oleŝmiritan gazetpaperon, donantan alian klarigon pri la puraj ŝtrumpoj.

La patro de eta Judit laboras en la ĉefurbo kaj kiam ne estas ege malvarme, li kutimas bicikli hejmen. Sed la nuna vintro estis malvarma kaj terure longa. La eta domo estis eĉ pli malvarma ol kutime, ĉar la kutima hejtaĵo, la karbo, fariĝis pli altranga ol ekz. la smaragdo. Paĉjo kutimas alporti karbon el la urbo. Sed oni donas nur dek kilogramojn. Kun tiuj dek kilogramoj paĉjo tramveturas al la stacidomo en la ĉefurbo. Ĉe la stacio de la antaŭurbo Judit kutimas atendi paĉjon kun eta sledo kaj nun ili transportas hejmen la karbon, ĉar la dometo staras du kilometrojn malproksime de la stacio. Poste klariĝas, ke la multekosta karbo estas mizere malmulta. Kiam Judit

la alian tagon revenis el la lernejo, apenaŭ oni sentis ian varmon de la trezoro. Ŝi kovris sin per amaso da tukoj kaj sidiĝis en la sofangulon por legi fabelon:

—Ĉu estis, ĉu ne estis — komenciĝas la fabelo — trans la vitromontoj vivis maljuna reĝo kun barbo ĝis la tero. Li havis junan filon, kiun li tre amis. Foje la reĝido diris al la patro: ”Kara patro, mi volas iri monden, por liberigi la stel-okulan reĝidinon el la kaptiteco de la sep-kapa drako.” La maljuna reĝo ekploris: ”Ne iru, mia ununura filo . . .”

Proksimume jene statis la afero en la fabelo, kiam eta Judit forskuis ĉiun kovraĵon de si kaj demandis panjon:

”Ĉu ne estas strange, ke en tiuj ĉi stultaj fabeloj ĉiam knaboj iras monden?”

Kaj poste:

”Panjo, donu monon al mi, mi ne revenos, ĝis mi sukcesos akiri karbon.”

Kaj Judit ekiris. Estis tre malvarme, sed estis belega vetero. Sur la arboj neĝfloroj brilis kaj ĉio plibeligis, ŝajnigis fea kaj trankvila tiun ĉi kulpan, penoplenan kaj malfeliĉan mondon. Judit iris antaŭen per etaj, rapidaj paŝoj. Ŝi pensis pri la fabelo kaj esperis renkonti tre maljunan onklinon. Malantaŭ ŝi glitis la sledeto. Kaj ĉu vi kredas, ĉu ne, subite eta Judit ekvidis maljunulinon. Ŝi tiris sledeton; sur ĝi estis precize dek kilogramoj da karbo. Judit iĝis gaja; okazis ja kiel en la fabelo.

”Onklino kara, kie vi aĉetis la karbon?”

”Iru, knabineto”, afable respondis la onklino, ”rekte, sed antaŭ la stacio deflankiĝu, kaj trans la spicvendejo vi vidos multajn homojn. Tie oni vendas karbon. Kvaronhora marŝo estas la tuto.”

Eta Judit feliĉe alvenis al la karbovendejo. Ho, kiom da karbo estis! Alta, impona sinjorino estis tie. Ŝi prenis la monon kaj malpura viro pesis la dek kilogramojn. Judit ne ŝatas kalkuli, sed rapide ŝi konstatis, ke ŝi havas monon por dudek kilogramoj.

”Onklino, ĉu mi ne povus ricevi dudek kilogramojn?”

Eta Judit ne ŝatas kalkuli, sed ŝi havas brilajn okulojn kaj tinte sonoranta voĉon. Kaj dank’al la lastaj, la sinjorino ordonis al la malpura viro:

”Johano, donu ankoraŭ dek al tiu ĉi eta bravulino.” La eta bravulino rapidis hejmen kun sia militakiraĵo. Fiera kaj kontenta ŝi estis. Ankaŭ panjo laŭdis ŝin. Sed ĉar la homo neniam estas kontentigebla kaj la dometo estis tre malvarma, ŝi aldonis:

”Imagu, se ni povus havigi ankoraŭ dudek kilogramojn.”

Judit jam vidis tiom en nia mondo, ke ŝi komprenis la ŝanĝemon de la moralaj principoj. Oni laŭdire ne rajtas mensogi, sed Judit jam sciis, ke ekzistas bonfaraj kaj motiveblaj mensogoj. Rapide ŝi do komprenis, aprobis kaj

kunagis la planon de panjo. Tiu plano donis esperon pri pluaj dudek kilogramoj da karbo.

La plano havis interesajn kaj ekscitajn detalojn. Unue Judit aliformiĝis. Ŝi ricevis sian tre malnovan vintran surtuton, sur la kapon tukon. Due: panjo ne plu estis panjo, sed onklino el la najbara domo. Tion oni devas fari tiel, ke ili ambaŭ ricevu po dek kilogramoj da karbo. Sed eta Judit devas ege atenti por ne perfidi la planon. La onklinigita panjo kaj la transformita filino alvenis la vendejon. La manko de la genia plano estis, ke oni ne povis kaŝi la nigrajn okulojn de Judit. La impona sinjorino rekonis la knabineton kaj diris:

”Knabineto, vi jam estis ĉi tie hodiaŭ.”

Judit: ”Ne, tiu ne estis mi, sed alia knabino.”

La impona sinjorino: ”Sed ŝi ege similis vin, eble ŝi estis via fratino?”

Judit (ricevis bonan ideon): ”Jes, ŝi estis mia fratino.”

La publiko ekridis, panjo komencis adiaŭi la karbon; la malpura Johano jam pretigis sin por reĵeti la karajn, brilajn, fabelajn dudek kilogramojn. Sed la sinjorino de-nove kaptiĝis de la brilaj okuloj kaj la trezoro ne forflugis. Ili posedis novajn dudek kilogramojn. Sed antaŭ la triumfa eliro, la impona sinjorino diris al Judit:

”Sed alian fojon ne perfidu vian fratinnon!”

Kaj jen, kion eta Judit respondis:

”Tiu ne estis mia fratino!”

”Sed kiu?”

”Estis mi mem. Mi eĉ ne havas fratinon.”

Ho, kia ridego ekestis! Panjo iom ektimis, ke Judit nun perfidos eĉ ŝin, sed eta Judit havas karakteron. Kaj la daŭrigo? La daŭrigo estis iom da varmo en la malvarma dometo, kiu rapide forpasas.

Eta Judit kun la paso de tiu varmo forgesas sian heroaĵon, ĉar tiu ĉi kruela vivo postulas novajn kaj novajn heroaĵojn eĉ de la etuloj. Kaj ilia forto, ilia lerto kaj la brilo de iliaj okuloj, donas forton kaj persiston ankaŭ al ni, kiujn sen ili tedus la kruela komedio, nomata: ”vivo en la milito”.

F. Szilágyi

La maljuna pomarbo

Ĉirkaŭ la domo troviĝis vasta ĝardeno, barita per fosto kaj latoj, kiel estas ĉirkaŭbaritaj la ĝardenoj en la montaj regionoj. En tiu ĉi ĝardeno kreskis multaj fruktarboj, ĉefe ankoraŭ junaj, kelkaj eĉ antaŭ nelonge plantitaj, nur post la domo staris inter la junaj arboj maljuna, tre maljuna pomarbo, senpinta kun raspa ŝelo, kun forsegitaj branĉoj, el kiuj iuj denove ekĝermis. Nur unu branĉo estis ankoraŭ netuŝita, sana. Dika kiel iu arbo ĝi pendis horizontale kaj rektiĝis supren apenaŭ tie, kie ĝi disiĝis en malgrandajn branĉetojn. La branĉoj elkreskintaj el la forsegitaj, floris ĉiam dum aŭtuno, nur la netuŝita floris printempe. Sed ankaŭ tiu jam delonge ne plu fruktis.

Sed tiam, kiam patro Preseĉnik la unuan fojon ligis ŝnuron sur tiun branĉon por malgranda Tonček, kie li balanciĝu, tiam la pomarbo estis ankoraŭ folioriĉa, kvankam jam maljuna. Tonček havis apenaŭ unu jaron. De tiam oni lin tie ĉiutage balancigis. La ŝnuron oni neniam deprenis, nur vintre. Kreskiĝinta li mem balanciĝis.

En la montaro ne troviĝis infanoj, kiuj kun li balanciĝu, tial li helpis al si mem, kiel li sciis kaj povis.

Post kiam li tiel jam dum kelkaj jaroj balanciĝadis, naskiĝis al la najbaroj, loĝantaj kelkajn pafdistancojn for, filino. Kreskinte kaj veninte iun tagon kun la patrino al la domo de Presečnik, Tonček tuj vidigis al ŝi sian balancilon. De tiam ili kune balanciĝadis. Sur la branĉo de la maljuna pomarbo estis ligitaj du ŝnuroj, tiel ke ne necesis al unu atendi, kiam la dua amuziĝis. Printempe la pomarbo floris, aŭtune sur ĝi maturiĝis belaj pomoj, kiujn ili balanciĝante manĝis, kaj ĉe tio kompreneble rezonis, kiel kutime rezonas infanoj. Kaj tiel ili ankaŭ rezonis iun tagon, kiam la pomarbo plej bele floris, kaj ili ambaŭ havis: Tonček dek du jarojn, Manca sep jarojn. Tiam flugante en la aero unu apud la alia, Tonček diris:

”Kiam vi elkreskos, Manca, vi fariĝos mia edzino. Mi opinias, ke vi ne kontraŭas, ĉu?”

Manca tute ne ruĝiĝis, ŝajnis al ŝi tute nature, ŝi priensis, kaj poste respondis treege serioze:

”Bona edzino mi estos al vi, nur vi ne rajtos bati min. Ĉu vi min ne batos?”

”Mi ne batos vin,” li respondis prudente, ”kial mi batu vin? Ĉu vi ne estos diligenta kaj honesta?”

”Tion vi ja povas supozi,” ŝi respondis. ”Nur mi timas, ke vi min batos. Nia patro preskaŭ ĉiutage batas panjon. Mi ne ŝatas la patron. Vi ne rajtos esti tia.”

”Mi eĉ ne tuŝos vin!” li diris trankvile kaj serioze.

”Vi ankaŭ ne rajtos trinki,” ŝi diris, ambaŭ estante alte en la aero.

Li iom pripensis, poste li respondis: ”Mi trinkos. Ĉar kia viro estas tiu, kiu ne trinkas? Mi ja hontus.”

Nun ŝi pensadis. Kaj kiam ili estis sur la alia flanko en la aero, ŝi diris: ”Se vi jam trinkos, almenaŭ drinkulo vi ne rajtos estiĝi. Alie mi ne volas vin. Mia patro ofte ebriiĝas kaj tio estas tre malbela!”

”Drinkulo mi ne estos,” li promesis. ”Se mi tamen devos trinki, vulgara mi ne estos. Gaja ebriulo mi estos kaj mi nur kantos.”

Manca ree pensadis kaj diris:

”Ne, pli bone estos, se vi tute ne trinkos. Vi ja povas malgraŭ tio esti gaja. — Kaj fumi vi ne rajtos.”

”Mi fumos, tion vi ja povas imagi! Mi ja hontus se mi dimanĉe antaŭ la preĝejo ne fumus cigaron.”

”Sed almenaŭ pipon vi ne rajtos fumi,” ŝi ekpetis. ”El la pipo tiel terure malbonodoras. Nia patro fumus pipon. — Kaj vi ne rajtos sakri. Tio estas tiel malbela! Nia patro ĉiam sakras, tiel ke mi timas kaj panjo hontas.”

”Mi ne sakros, Manca, se vi tiel volas,” li promesis. ”Tiel, iun diablon mi foje alvokos. Tio ja decas al viro!”

”Nu,” konsentis Manca, ”tiom mi tamen permesos al vi, ĉar ĉiuj ja tiel parolas. Nur ion pli malbelan vi ne raj-

tos diri! — Kaj aliajn virinojn vi ne rajtos rigardi, kaj ne diri al mi virinaĉo aŭ ion similan!”

”Mi ne interesiĝos pri la aliaj, mi ĵuras al vi. Ĉar se mi vin amos, kaj se vi estos bela, kial mi rigardu la aliajn? Ankaŭ mi neniam diros al vi virinaĉo. Tiel oni diras nur al tiuj, kiuj estas malbonaj. Sed vi estos bona.”

”Nia panjo estas ankaŭ bona, sed tamen patro diras al ŝi virinaĉo, kaj eĉ pli malbelajn esprimojn, kiuj tute ne decas.”

”Nu,” li promesis, ”tia, kia estas via patro, mi ne estos!”

Tiel interkonsentis Tonček Presečnik kaj Manca Hojnik, kiam li estis dekdujara kaj ŝi sepjara. Ili ankoraŭ balanciĝadis kune jaron kaj pli, poste ili kreskis kaj kelkajn jarojn ili nur honteme rigardis unu la alian, se ili iam renkontiĝis. Ili deziris renkontiĝi, sed ne povis liberiĝi de la laboro kaj iel ili ankaŭ hontis.

Tiel pasis jaroj. Ili elkreskis kaj tiam iun dimanĉan posttagmezon venis Manca, jam matura junulino, al la domo de Presečnik, kie ŝi hazarde trafis Tonček solan hejme. Kun gazeto en la mano li kuŝis sub la pomarbo, sed pli observante la branĉon super si, kie la suno ne povis penetri tra la foliaro. Manca tre ruĝiĝis, trovante lin sola, sed li baldaŭ konsciiĝis kaj proponis al ŝi la lokon apud si. Ne Tonček, sed la maljunan pomarbon ŝi

observis, kiu estis jam forte dehakita, kaj malgraŭ tio konservis pli ol sufiĉe da memoroj .

”Ni devis debranĉigi ĝin,” li diris, ”ĉar la branĉoj sekiĝis. Nur ĉi tiu restis. Stranga pomarbo; la detranĉitaj branĉoj elpuŝis ĝermbranĉetojn kaj ili floras ĉiuaŭtune, sed ĉi tiu maljuna floras printempe. Sed ĝi ne fruktas. Malgraŭ tio mi ne forhakos ĝin.”

”Ĉu vi ne forhakos ĝin?” ŝi diris mallaŭte.

”Ne,” li konsentis, ”neniam mi ĝin forhakos. Patro jam volis tion fari, sed mi ne konsentis. — Ĉu vi memoras, kiel ni ĉi tie iam balanciĝis?”

Ŝi ruĝiĝis, mallevis la rigardon, sed ĉarme ekridetis.

”Ĉu vi memoras, kion vi tiam promesis al mi?”

Ŝi ridetis ankaŭ nun, sed jam iel amare; fine ŝi diris trankvile:

”Ni estis infanoj. Nun ĉio estas alia!”

Li iomete pensis, sed post ioma tempo li respondis mallaŭte, sed serioze:

”Nenio estas alia. Ĉu vi venos al mi? Ĉu vi volas?”

Ŝi kapneis.

”Tiam ni estis infanoj. Sed nun aliaj decidis. Vi ja scias, ke viaj ne toleras la niajn. Patro estas drinkulo kaj ni malriĉiĝis . . .”

”Tio estas negrava. Vin mi volas. Kaj niaj nenion diros al mi. Nur diru, se vi volas, kaj mi venos preni vin! Vere mi venos!”

Kaj post longa pripensado ŝi respondis:

”Se viaj ne tro kontraŭos, mi venos.”

Li kontente kapjesis, maĉis la herbon, fine li diris mal-laŭte:

”Manca, mi kisos vin, se vi ne koleros?”

”Ne,” ŝi respondis kaj ruĝiĝis. ”Iu nin vidos. Se jam devas esti, prefere alifoje kaj aliloke!”

”Ne,” li diris, ”oni vidu nin!”

Kaj jam li tiris ŝin al si kaj kisis ŝin.

”Tiel, nun ni interkonsentis.”

Kaj post ioma tempo li diris firme:

”Tiun pomarbon mi neniam forhakos. Ĝi restos al ni por memoro, ĉu ne? Ĝis kiam ĝi staros, ni amos unu la alian.”

”Jes, mi ĉiam amos vin.”

Du jarojn poste la juna Preseĉnik la unuan fojon portis eksteren sian unujaran infanon, ligis ŝnuron sur la branĉon de la maljuna pomarbo kaj balancigis lin. Al la infano tio tiel plaĉis, ke li senĉese balanciĝus. Post la unua alvenis ankoraŭ kvar infanoj kaj ĉiu volis balanciĝi sur tiu maljuna pomarbo.

”Ne,” diris Tone al Manca, ”neniam mi ĝin forhakos. Al ni ĝi alportis tiom da feliĉo, kiam ni du ĉi tie balanciĝis. Niaj infanoj same ŝatas balanciĝi sur ĝi. Ĝi restos al ni je memoro. Se mi al io dezirus rigardi, kiam mi estos mortanta, estu ĝi.”

”Vi ne rajtas ĝin forhaki,” konsentis Manca ridetante.
”Ĉi tie ni renkontiĝis, feliĉon ĝi portis al ni . . .”

”Kiam mi la lastan fojon donos al vi la manon,” li diris kaj ion meditis, ”ni rigardos ĝin kaj memoros pri ĉio . . .”

Kaj tiel okazis .

Unu tagon . . .

Unu tagon, multajn jarojn poste, kiam la infanoj estis jam plenkreskaj kaj kiam venis tiuj teruraj jaroj, eniris ankaŭ la domon de Preseĉnik la ŝvaboj*. Ili ligis Tonen kaj Mancan, ili juĝis ilin: du infanoj iris al la partizanoj, la knabinoj, kiuj estis arestitaj kune kun ili , subtenadis la partizanojn. Ankaŭ ili du subtenis la partizanojn, ili ĉiam atentigis ilin se ili, la ŝvaboj, estis alproksimiĝantaj!

Kaj sur tiun branĉon, sur kiu ili iam kiel infanoj estis balanciĝantaj, oni ligis du ŝnurojn kaj faris maŝojn. Oni kondukis ilin sub la pomarbon, sub tiun maljunan branĉon. Estis aŭtuno. La junbranĉetoj sur la detranĉitaj branĉoj pompe floris kun bela delikate rozkolora floraro Tie ili staris, Tone kaj Manca, ili staris kaj rigardis unu la alian. Poste ili observis la branĉon super si, tiun branĉon, de kiu nun pendis la ŝnuroj. Ĉio estis tiel terure simila al io . . . al io iama, al la juneco; al tiu june-

* ŝvabo = germano; laŭ la nomo kiu estis donita iam al germanaj koloniistoj en Vojvodina; ili parte venis el la germana provinco Schwaben.

co, kiam ili kiel infanoj ĉi tie renkontiĝis. Kvankam li havis la manojn ligitaj, Tone tamen ektuŝis la manon de Manca kaj amare ekridetis

”Ĉi tie ni renkontiĝis, Manca.”

Ŝi reridetis amare.

”Ĉi tie mi diris al vi, ke mi amas vin kaj vi al mi, ke vi estos al mi edzino.”

Ankaŭ nun ŝi amare ekridetis.

”Kaj ĉi tie, mi diris, mi dezirus premi al vi la manon, kiam mi estos mortanta. Vidu, tio realiĝas.”

Tiam ambaŭ amare ekridetis.

”Nur tion ankoraŭ diru al mi: ĉu vi estis feliĉa?”

Ŝi ekrigardis lin rekte en la okulojn, profunden, kiel ŝajne ankoraŭ neniam, kaj ŝi diris:

”Mi estis feliĉa. Kaj vi, ĉu vi estis feliĉa?”

”Mi estis feliĉa,” diris Tone kaj kapjesis. ”Tiun feliĉon oni ne povas forrabi de ni, ĉu ne?”

”Ne, al ni oni ne povas.”

Tie sur tiu branĉo de la maljuna pomarbo, kiu floras printempe kaj aŭtune, restis nur du pecetoj da ŝnuro: la unua de tiu, sur kiun oni pendigis Tonen, kaj kiu deŝiriĝis, la dua tiu de Manca: ŝian oni fortranĉis. La domon oni bruligis kaj la knabinojn oni forkondukis. La du filoj estis ĉe la partizanoj.

Tie sur tiu maljuna pomarbo estas eble ankoraŭ nun la du pecetoj de la ŝnuro, kiuj restis de la terura balan-

cilo. Neniam iu forprenis ilin, neniŭ tuŝis ilin. Ili restos tie, ĝis kiam ili forputriĝos aŭ ĝis kiam la pomarbo finsekiĝos. Nun ĝi ja ne plu havas kaŭzon stari: ĝi necesas al neniŭ konservi la memorojn pri bela feliĉo. La geedzoj Preseĉnik, kiuj ĝin tiel amis, estas mortintaj. Aŭ eble la gefiloj, se ili revenos, konservos ĝin je memoro? Ne je memoro pri feliĉo, sed je memoro pri la teruraj tagoj? Ne, tia memoro estas tro amara, tro turmentige estus rigardi ĉiutage al tiu maljuna pomarbo, al tiu branĉo, kie komenciĝis kaj finiĝis la feliĉo de iliaj gepatroj.

Miško Kranjec

El la slovena tradukis D. Mizerit

La aglino

Estis mateno, kaj la suno hele brilis. La fratino de la aglo sidis en sia nesto sur ŝtonego kaj sopirante rigardis en la hela aero, kaj levis nevole siajn ankoraŭ neprovitajnflugilojn. Fiere ŝia brusto leviĝis.

”Al la suno! Alten al la suno!” tiel sonis interne de ŝi. ”Kial mi ne vidu la gloron de pli proksime, kaj ne banu mian okulon en ĝia lumo, kaj ne trinku forton el ĝiaj radioj? Kial ne estu prikantata la sunirado de aglino, kiel ĝi estas de aglo? Mia rigardo estas forta, miajflugiloj junaj, mia volo forta; alten, alten, al la suno, al la suno!”

Ŝi flugis. Mateno, sunlumo, freŝeco de la senfina aero, kaj sento de juneca forto plenigis ŝian bruston per ĝojo.

Por iom ripozi, rigardi ĉirkaŭ si kaj ĝui la novan, belan vivon, ŝi metis sin sur pinton de kverko.

En la arbaretoj malsupre ĉiuspecaj birdoj kolektiĝis. Ili estis rimarkintaj ŝian kuraĝanflugadon.

”Trilili, bone, bone, trilili!” ĝojkantis la alaŭdoj; ”daŭrigu, aglino! Vi estos honoro por via sekso!”

”Kuraĝon!” nobla ardeo kriis, ”kuraĝon, mia amikineto!”

”Vivu, fratino, vivu,” la blankaj cignoj kantis, naĝante inter verdaj insuletoj.

”Kraŭk, kraŭk!” la korniko kartavis, ”tia rapideco estas danĝera; gardu vin, kara fraŭlino!”

”Turtulutu!” la kolombo kveris, ”kial vi serĉas feliĉon tiel malproksime? Restu hejme en via nesto, varmiĝu ĉe via edzo, kovu viajn ovojn, kaj donu manĝaĵojn al viaj idoj, kaj vi vivos dum multaj, multaj jaroj! Turtulu!”

”Hui! klevit, klevit!” la strigo kriis, ”jen fariĝos danĝero!”

”Jen fariĝos danĝero,” la sturnoj kaj papagoj ripetis.

”Iras bone, iras bone!” aro da gajaj anseroj kriadis, ”tre bone!”

Sed juna, nobla aglo sidiĝis apud la flanko de la aglino, kaj diris dolĉe kaj karese:

”Via iro estas bela, sed la vojo longa kaj via forto tro malgranda ankoraŭ. Permesu al mi, ke mi vin akompanu; kiam vi ŝanceliĝos, mia flugilo subtenos vin, ĝi ombrigos viajn okulojn, kiam la suno volos ilin blindigi, kaj kiam danĝero vin minacos, aŭ kiam vi laciĝos dum la irado, mi vin kondukos en mian trankvilan neston, kiu estas tie sur la malproksima monto, kaj vi restos ĉe mi!”

Dankeme, sed malakceptante, la aglino mallevis sian kapon antaŭ la nobla birdo. ”Mi volas esti sola,” ŝi diris;

”solega mi volas krei mian sorton!” La kriojn de la aliaj birdoj ŝi apenaŭ aŭdis. Ŝi povis nur aŭskulti la vokon en sia propra brusto: ”Alten al la suno, al la suno!”

Kaj ŝi ree levis la flugilojn. Ebriigita de suno, freŝeco kaj ĝojego ŝi flugis pli kaj pli alten kaj malproksimegen de la aliaj. Malĝoja kaj melankolia, la juna aglo skuis siajn flugilojn, deturnis sian rigardon de la fieregulino, elektis por si alian edzinon, kaj kondukis ŝin en sian neston, kiu estas sur malproksima monto.

La aglino flugis solega kaj vidis la sunon de pli proksime. Sed ho ve! Tiam subite ŝiaj okuloj blindiĝis, ŝia kapo turniĝis kaj ŝi ne plu vidis klare sian vojon. Ŝi flugis ankoraŭ, sed nevole ŝi malsuprenflugis teren. Ĉasisto vidis tion, kaj celis per sia mortiga pafilo; li pafis kaj la kuglo trafis la koron de la aglino.

Ŝi flugis ankoraŭ, sed ne plu sunen, ŝi flugis al la profunda, profunda arbaro. Ŝi sentis sin trafita de la morto. Profunde en la plej malluman arbaron ŝi flugis, kaj la malluma arbaro fermiĝis ĉirkaŭ ŝi kaj kaŝis ŝin por ĉies rigardoj.

Sur branĉo de pino sidis la aglino kun sanganta brusto kaj kun larmoj en la estingiĝanta okulo.

”Estas bone por mi,” ŝi mallaŭte diris, ”ke al la aglino estas permesite morti nebedaŭrata kaj sen apudestantoj.”

Tiam ŝi aŭdis la kolombon diranta al siaj idoj:

”Filinoj miaj, ne faru kiel la aglino. La fera malsaĝulino certe estis bruligata dum sia irado. Restu hejme en via valo, en viaj trankvilaj nestoj, kaj vi vivos dum multaj, multaj jaroj.”

”Mi eraris!” la aglino diras (sed fiere la koro ŝvelis sub la vundo) ”mi eraris en mia juneca kuraĝego kaj estas punita. Sed trankvile mi suferos mian sorton. Aliaj estu pli feliĉaj! Mi ne plendas. La sunon mi tamen vidis de pli proksime.”

”Klevit, klevit!” la strigoj akre kriadis. ”Klevit!” ripetis la sturnoj kaj papagoj. ”Iras bone, iras bone!” moke kantadis la ansera amaso antaŭenflugante super la arbaro.

”Mi mortas,” la aglino diris kun estingiĝanta forto. ”Mi mortas, sed . . . la sunon mi vidis de pli proksime! Feliĉo al mi!”

Kaj de la branĉo, kie ŝi sidis, ŝi falis sur la teron, kun etenditaj flugiloj . . . kaj ŝi ne vivis plu!

Fredrika Bremer

El la sveda tradukis Fredrik Skog

La kverka visko

Iun tagon — la precizan daton mi ne memoras, sed estis proksimume du jarojn post la morto de Heraklo — multaj homoj kaj multe da bruoj estis en Delfo. Tiu tago estis la lasta de la Pitiaj ludoj, kaj — ”okazo neniam vidita!” — la luktoj kaj kuroj finiĝis sen rigardantoj, la atletoj kaj ĉaristoj triumfis nekonate, kaj oni eĉ diras, ke la poeto Simonido, kiu tiam kantis en libereco la gloron de mi ne scias kiu ĉevalo, havis nur, aŭ preskaŭ nur, sian heroon kiel aŭdanton.

Sed kompanse je la malpleneco de la areno, la publiko superplenigis la templon de Apolono. Unu vorto, unu magia vorto, sufiĉis por kurigi ĝin tien: Jen la Heraklidoj! Kaj tiun alkuron de tuta popolo ekmovita de nura homo, vi komprenos senpene, fratino mia: neniu francino, mi pensas, rezignus plej volonte loĝion en teatro por vidi la filon de Napoleono (tiun palan junulon, kiu vidiĝis tiel mallongan tempon!) Nu! Heraklo estis la Napoleono de tiu epoko, kaj la Heraklidoj estis liaj filoj. Unu monaton antaŭe Ateno trovis ilin, je sia vekiĝo, eltronigitaj, per-

sekutataj, senazilaj, kisantaj sur la publika placo la altaron de Kompatemo. Ilia plendo ekmovis ĉiujn korojn kaj ĉiujn glavojn, kaj en la momento, pri kiu mi rakontas, la gastama urbo, sin arminta por ili, sendis ilin fronte de procesio por demandi, laŭ la kutimo, la orakolon de Delfo pri la fino de la milito. Delfo — verŝajne vi scias tion — estis sankta urbo plena da mirindaĵoj; sed tiam ĉiuj trairis tiujn mirindaĵojn sen atento, kaj mi agos kiel ĉiuj. Mi ne promeniĝos vin de la Parnaso ĝis la Hipodromo kaj de la Hipodromo ĝis la tripiedo, maldubante, ke jam antaŭ longe vi faris tiun pilgrimon kune kun certa verkisto, pli lerta gvidisto ol mi; cetere mi konfesos, ke ankaŭ mi avidas vidi sen plua prokrasto tiujn famajn Heraklidojn.

La tuta Grekujo, vidante ilin, eksentis nur unu senton — admiron: kaj tiu sento montriĝis per unu brua kaj unuanima ekkrio: "Senmortaj Dioj! kiel grandaj kaj fortaj ili estas!"

Altkreska maljunulo, kiun pro lia orumita bastono kaj lia kapzono el blanka lano oni povis rekoni kiel unu el la dudek reĝoj de Grekujo, sin klinis al la orelo de Apolona pastro, kiu trairis la templon portante parfumvazon.

"Mi tre konis Heraklon kaj Dejaniron," li diris, "kaj mi sciis nur pri tri filoj iliaj. Kiu do estas tiu vualita virgulinino, sidanta sur la sama benko kiel la Heraklidoj?"

”Vi ne eraras, Patro: Heraklo havis nur tri filojn de Dejaniro, sed lia lasta edzino, Iolo . . .”

”Prave!” interrompis la maljunulo, frapante sian frunton per la fingro en signo de rememoro. ”Filokteto multfoje rakontis al mi tiujn detalojn, sed du jarcentoj, falante sur ies kapon, tre povas ŝanceli ĝian memoron . . . Jes! nun mi memoras pli bone, ke unu filino naskiĝis de tiu edziĝo . . .”

”Unu filino kaj unu filo, patro,” diris dolĉa voĉo post la maljuna reĝo, kiu turnis la kapon kaj vidis palan delikatan junulon vestitan en la Argolanda kostumo.

”Unu filino kaj unu filo,” ripetis la interrompinto, ruĝiĝante: ”Iksos kaj Makaria.”

La maljunulo ridetis. ”Vidu,” li diris al la pastro, ”oni admiris mian scion en Piloso, kaj jen Argoso sendas al mi siajn lernejanojn por min instrui. Kiu vin informis tiel bone, kaj kio estas via nomo, mia bela infano?”

Sed la juna knabo forglitis sen respondo de sub la kareso de Nestoro — ĉar tiu maljunulo estis Nestoro — kaj malaperis en la ĉeestantaron.

Ĉie la sama laŭdo zumadis sen varioj: ”Senmortaj Dioj, kiel grandaj kaj fortaj ili estas!”

En Francujo tiu komplimento sendube ŝajnas stranga, eĉ preskaŭ ironia; sed pensu, ke tie ĉi vi estas en lando, kiun la kapricoj de la terreliefo kaj de la ambicio distranĉis en dudek malgrandajn ŝtatojn, kies reĝetoj, fieraj

kaj koleremaj, kunpremitaj unu al alia, sin kubuttuŝadis reciproke kun minaca murmuro, kaj kie la kutimo, ĝenerala en la tuta antikva tempo, batali viro kontraŭ viro kaj korpo ĉe korpo, faris la homan forton sola povo, mi preskaŭ dirus sola virto. Tiutempe oni konjektis la meriton laŭ la pugnoj kaj ŝultroj, same kiel nun oni serĉas ĝin sur la frunto kaj en la okuloj. Fine, kaj tio ĉi estas plej karakteriza, — Heraklo, personigo de forto, Heraklo estis dio!

La pitia pastrino malfruigadis sian venon; tamen oni aŭdis nenian malpacienca murmuron. La publika sci-volemo havis nutraĵon. Hillos, la unuenaskita Heraklido, precipe altiris la rigardojn. Li estis kolosa militisto, kun nudaj muskolplenaj brakoj kaj indiferenta, larĝa vizaĝo, kaj, kun felo de leono sur la ŝultroj kaj bastonego en la mano, afektis la patrajn teniĝojn. Oni kredus vidi Heraklon mem, Heraklon en sia dudeka jaro. Antenor, la proksima post Hillos, havis pli delikatajn trajtojn kaj malpli dikan korpon. Li kontente paradis en sia freŝa dieco, ridetis al la junaj grekinoj, kaj per larĝigitaj naztruoj enflaris volupte la parfumojn de admiro. Unuvorte, la dia Antenor estis tio, kion ni mortuloj ordinare nomas vantulo. La tria frato, Ajgistos, havis, krom forteco kaj braveco, nenion komunan kun siaj fratoj. En tiu epoko kaj en tiu lando li estis vivanta anahronismo. Stranga detalo! Li havis blondajn harojn, kaj lia vizaĝo esprimis melankolion, senton tute modernan kaj kristanan. El la plej teru-

raj bataloj li revenadis hejmen malkruela kaj singĝenema; li ŝajnis esti, sub la suno de Grekujo, unu el tiuj blondaj militistoj nordlandaj, kiuj terenvenkis gigantojn kaj monstrojn kaj poste, sen murmuro, klinis la kapon sub vergo de eta feino. Ŝajnis ke, bedaŭrante Argoson, li priploris ion pli valoran ol trono. Kien do forflugis liaj sopiroj? Al amika hejmo? Al patrina tombo? Neniu scias, ĉar neniam al iu li diris sian sekreton, eĉ ne al sia juna fratino Makaria, kiu tamen estis la konfidulino de la tuta familio. Pardonu, fratino, ke tiel longe mi forgesis la virgulinon pro la herooj. Ĉu ŝi ne estas kulpa en tio? Vidu! Kaŝita en la ombro de siaj fratoj, ŝi ĉiel agas, por ke oni ŝin forgesu. Ŝi ankoraŭ ne levis sian vualon, kaj ŝiajn trajtojn vi ne konas; sed jam vi ŝin amas, ĉu ne? ĉar vi jam scias, ke ŝi estas pia kaj modesta.

Sed jen oni anoncas la pastrinon; ankoraŭ lacega de siaj lastaj konvulsioj profetaj, ŝi malrapide sin trenas ĝis la tripiedo, apogante sin sur du pastroj de Apolono. Jen subite, ĉe la fundo de la sanktejo, larĝe malfermiĝas por-do, kaj vasta, sonora ventoblovo elfluegas, balaante la fumon de la buĉoferoj kaj skuante sur la ĉeestantaron la sakramentan anoncon, tondravoĉe parolatan: "La dio! jen la dio!" Jam la profetino turmentate tremegas sur la tripiedo, kaj oni aŭskultas . . . Eliĝis unue plorspasmoj, poste timemaj silaboj, nekompreneblaj vortoj. Fine la dio parolis:

*Minervo batalos . . . Sur kasko la ŝia
 Soifas l' otuso kaj vane baraktas.
 Minervo alvokas fratinon la sian,
 Fratinon la Venkon neniam ribelan.
 Mi aŭdas: . . . alflugas la Venko . . . Sed ankaŭ
 Soifas l' otuso avida je sango
 Argoso atendas la reĝojn la siajn
 Por ilin diigi . . . Vi tremu, Argoso!
 L' otuso kruela minace rondflugas . . .
 Rondflugas, serĉante viktimon plej puran . . .
 Rondflugas . . . kaj . . . ekfalas . . .
 Sur idon de Alkido!*

Ĉe tiu parolo, tiel fatala por la Heraklidoj, nur tri homoj en la templo ne ekstremis: la Heraklidoj.

”Montru la viktimon per lia nomo,” kriis Hillos al la pastrino.

Sed ŝi spiregadis, preskaŭ mortanta, sur la ŝtupoj de la tripiedo.

”La dio estis terura; dua provo ŝin mortigus,” solene diris la ĉefpastro. ”Unu el la Heraklidoj sin oferu.”

”Mi min ofertas,” kriis en la ĉeestantaro dolĉa voĉo, tiu sama, kiu iom antaŭe parolis al Nestoro.

”Kiu vi estas, kaj kio via nomo?” severe diris la pastro.

”Mi estas filo de Heraklo, kaj mia nomo estas Iksos.”

Zumo de surprizo akceptis tiun respondon.

”Se li diras la veron, li estas ĝuste nomita,” murmur-etis moka voĉo.

Vi sciu, fratino, ke Iksos estas greka vorto signifanta *visko*. Verŝajne la gepatroj de la infano malŝate ĵetis al li tiun nomon, kiam li naskiĝis; kaj efektive tiu malfortika kreitaĵo, enplantita sur tiel forta raso, tre similas la malgrandan parazitajn plantojn, kiu tremetas en la vento sur la altaj kverkoj.

”Ni malpermesis, ke vi sekvu nin al Delfo,” diris Antenon, minace alpaŝante al Iksos . . . sed la filino de Heraklo, ĝis tiam senmova en la ombro, ĵetis sin inter la du fratojn, prenis la manon de la pli juna, kaj tiris lin el la templo, surda je la voĉo de Hillos, kiu ŝin revokis, surda je la admiro, kiu murmuretis, dum ŝi pasis, — ĉar pro ŝia rapida iro ŝia vualo leviĝis propramove, kaj Makaria estis bela! bela de beleco kaj gracio, bela precipe en la tiama momento de tiu kompatato en okuloj kaj voĉo, kiu beligus eĉ la malbelecon.

Reveninte Atenon, kien unu sama ĉaro reveturigis la tutan familion, la tri militistoj decidis, ke la sekvantan tagon ili lotumos en la templo de Minervo por scii, kiu el ili mortos. Sed kiam la kompatinda Iksos alvenis, ĝoĝa kaj fiera, por enmeti kun siaj fratoj sian nomon en la urnon, ili flankenpuŝis lin, pensante, ke ili insultus la diojn, se tiel ili prezentus al la ofte ŝercema Sorto la okazon ĵeti al ili tian mokan kaj senvaloran oferaĵon. Ili malpermesis

ankaŭ, sed pro malsama motivo, ke Makaria risku kun ili la ŝancon de morto. Ŝi estis fianĉino de Likos, unu el la influaj ĉefoj de Ateno (Ateno, kiu sin armis por ili), kaj pro politiko aŭ pro dankemo ili postulis, ke la preparo por la ofero neniel interrompu tiun por la edziĝo. Tial Makaria ĉe la reveno trovis sian ĉambron tute parfumita de la donacoj de Likos. Sed en tiu momento ŝiaj pensoj, jam funebrante fraton, ne estis edziniĝaj pensoj. Tamen la edziniĝa girlando estis farita el lilioj tiel belaj, ke per mano senatenta, kaj preskaŭ nevole, Makaria metis ĝin sur sian frunton. En tiu momento ŝi aŭdis, malantaŭe, malbone subpremitan ekĝemon, kaj sin turnis . . . Estis Iksos, Iksos ŝia frato, de kiu ŝi estas kaj patrino kaj fratino; Iksos, kiun ŝi envolvas per sia zorgado, ĉar li suferas kaj estas malŝatata; Iksos, kiu ĉe ĉiu paŝo en la domo nepre renkontas la rideton de Makaria, kaj al kiu la domo ŝajnos malplena kaj tro vasta, kiam Makaria ne plu plenigos ĝin. Li estis rigardanta la simbolajn florojn per okuloj brilantaj de larmoj, kaj lia vizaĝo esprimis tian doloron, ke la fratino, kiu tamen de dek du jaroj kutimis vidi lin suferi, eksentis timegon.

”Ho! kompatindulo!” ŝi diris, ”pardonu al mi!”

”Pardonu al vi, Makaria? Kion do? Ĉiujn viajn feliĉigojn al mi?”

”Ne danku min pro mia zorgado: ĝi estas ŝuldo, ĝi estas kulp-elpago . . .”

La miregantaj rigardoj de la infano postulis la solvon de tiu enigrno.

"Aŭskultu!" ŝi diris: "antaŭ kvar jaroj (tiam vi estis okjara, kaj mi dekkvarjara) okazis en nia familio io mirinda kaj fatala, kion la patro kaj fratoj neniam eksciis. Vi memoras tiun kabanon, kiun ili starigis sur la bordo de la maro por sin rifuĝi de multenombraj kaj potencaj persekutantoj? Iun vesperon la patro kaj fratoj estis foririntaj por ĉasi; laca pro dematena kurado tra la arbaroj, vi estis ĵus eniĝinta en profundan dormon, lulata de la monotona bruo de la pluvo sur la kabanon. Noktis jam de longe, kaj la patro kaj fratoj ankoraŭ ne revenis. Fine mi ekaŭdis frapadon je la pordo; mi malfermis ĝin, kredante, ke mi malfermos al ili. Estis vojaĝanto, kiu petis azilon kaj fajron por momento. Li eniris. Sidante ĉe via lito, dum li sekigis siajn vestojn antaŭ la fajrejo, mi vidis kun surprizo dolĉan kaj nebulan lumon kuranta sur liaj blondaj haroj. En la unua momento mi atribuis tion al la rebrilo de la fajro; sed la fajro estingiĝis, kaj la frunto de la vojaĝanto restis luma. Tiam mi rekonis Apolonon; Apolonon, kiu, elpelita el Olimpo, travagis la mondon alivestita, sed kiu ne estis plene sukcesinta estingi sian aŭreolon.

'Granda dio!' mi diris, kunplektante la manojn, 'kion vi volas de mi?'

'Nenion,' li respondis, 'nenion krom rifuĝejo; sed la vetero tuj beligōs, kaj mi foriros; ricevu ĉi tiun adiaŭan kison.'

Tiam mi tremante alpaŝis al mia onklo, kaj, kondukante lin per la mano al la lito, kie vi estis ankoraŭ en dormo: 'Vi karesu prefere tiun kompatindan infanon,' mi diris, 'ĉar neniu dio lin karesas; vi tuŝu liajn palajn vangojn, por ke ili refloru; vi spiru sur liajn lipojn, por ke ili kantu.'

La dio ridetis je mia preĝo; li sin klinis al vi kaj spiris sur vian buŝon; sed tiu brulvarma elspiraĵo, glitinte ĝin via koro, ĝin plenigis kaj ŝveligis kaj jen kial via koro ĉiam brulas kaj palpitadas; jen kial vi velkas kaj mortas, kompatinda infano . . . Kaj nun, kiam vi scias ĉion, ĉu vi pardonos al mi?"

Iksos kisis ŝin; tio estis respondo.

"Pravu do ĝin per obeado de miaj konsiloj. Riske-mulo! Dank'al kiu feliĉa miraklo vi ne mortis de malsato kaj soifo sur la longa vojo de Ateno ĝis Delfo?"

"Ho!" diris Iksos, "de la mateno mi estis farinta mian vojaĝkanton. Ĉiufoje, kiam mi vidis sur domo fumon de festeno, mi frapis la pordon, kantante, kaj ĉiam oni malfermis al mi."

"Mirinda kanto!" diris Makaria, ridetante, "vi konigu ĝin al mi, Iksos, por ke ankaŭ mi kantu ĝin, kiam mi iros al Delfo aŭ al Olimpio."

Iksos, pro ia koketa modesteco, komuna, ŝajnas, al la kantoverkistoj de ĉiuj epokoj, lasis ŝin iom peti, kaj fine cedis.

LA KANTO DE IK SOS

I

Malfermu vian pardonon! mi estas Iksos, la kompatinda kverka visko, kiun ventpuŝo mortigus.

Iun tagon, antaŭ dek du jaroj, pigmeo falis el la leona felo de Heraklo; tiu pigmeo estis mi. Mia patro ne min amis, ĉar mi estis malforta kaj malgranda; kaj kiam, infaneto, mi albatiĝis al liaj genuoj, mi aŭdis super mia kapo voĉon bruegantan kiel la fulmotondro. Miaj fratoj min batas, kiam mi laŭte nomas ilin fratoj; kaj tamen mi volas vivi, ĉar mi havas fratinon, kiu min amas . . . Tiel bona ŝi estas, Makaria!

Malfermu vian pardonon! Mi estas Iksos, la kompatinda kverka visko, kiun ventpuŝo mortigus.

II

Iam miaj fratoj al mi diris: "Ci estu iel utila; ci lernu starigi statuojn kaj altarojn, ĉar eble ni estos dioj."

Mi penis obei miajn fratojn, sed pezegaj estis martelo kaj ĉizilo! Kaj krome, strangaj vizioj pasadis, senĉese pasadis, inter mi kaj la Parosa bloko, kaj mia senatenta

ŝingro skribadis sur la polvo unu nomon, ĉiam la saman, la dolĉan nomon de Makaria.

Malfermu vian pardonon! mi estas Iksos, la kompatinda kverka visko, kiun ventpuŝo mortigus.

III

Tiam miaj fratoj al mi diris: "Ni havas gaston en la palaco, blankan maljunulon el Ĥaldeo, kiu scias legi en la ĉielo la venontajn okazojn. Aŭskultu liajn instruojn kaj diru al ni, ĉu ci vidas en la nuboj trezorojn aŭ venkojn alvenantajn." Mi aŭskultadis la maljunulon; mi pasigis longajn serenajn noktojn rigardante la ĉielon; sed mi vidis nek trezorojn nek venkojn; mi vidis nur la malsekajn brilajn stelojn, kiuj rigardis min kun amo, . . . kiel la okuloj de Makaria.

Malfermu vian pardonon! Mi estas Iksos, la kompatinda kverka visko, kiun ventpuŝo mortigus.

IV

Tiam miaj fratoj al mi diris : "Ci prenu pafarkon kaj sagojn, kaj iru ĉasi en la arbaroj." Mi travagis la arbarojn kun pafarko kaj sagoj, sed baldaŭ forgesis la ĉason kaj miajn fratojn. Dum mi aŭskultis la kanton de la ventoj kaj de la najtingaloj, cervino manĝis mian panon en mia robo, kaj birdeto, laca de longa flugo, venis endormiĝi en mia sagujo. Mi portis ĝin al Makaria.

Malfermu vian pardon! mi estas Iksos, la kompatinda kverka visko, kiun ventpuŝo mortigus.

V

Tiam miaj fratoj al mi diris: "Neniel utila ci estas," kaj ili min batis; sed mi ne ploris, ĉar mi pensis al mia fratino. Kaj morgaŭ oni prenos mian fratinton for de mi: kaj morgaŭ, kiam Makaria, sidante ĉe la edziĝa festeno, diros: "Kio do estas tiu blua fumo, kiu supreniras tie post la laŭrujo?" — "Ho, nenio," diros la festenantoj.

Ĝi estas la brulstako de Iksos, la kompatinda kverka visko, kiun ventpuŝo mortigis.

"Ne, vi vivos!" kortuŝite diris la junulino. "Mi ŝirmos vin en mia koro tiel bone, ke ĉiuj ventegoj pasos, netuŝante vin eĉ per bloveto plej malgranda. Likos estas feliĉa kaj festata, kaj la virgulinoj Atenaj estas multaj. Al vi sola kaj suferanta, ĉiujn miajn horojn kaj ĉiujn miajn amojn! Kompatinda kverka visko, vi ornamos mian bruston pli bele ol la edzina bukedo. Frato mia, poeto mia, jen la pago por via kanto." Kaj deŝirante de siaj haroj la edziniĝan girlandon, ŝi ĵetis ĝin, malseka de larmoj, al la piedoj de Iksos. Iksos volis respondi, sed, traskuita de neatenditaj emocioj, la kompatinda infano apenaŭ provis eligi ekkriion. "Ho!" li diris; kaj metante la manon sur sian koron, li falis. La febro malkvietigis lin la tutan nok-

ton, kaj la tutan nokton Makaria maldormis kaj ploris ĉe la lito de sia frato.

La sekvanta tago estis tiu, kiam la tri Heraklidoj iros en la templon por demandi pri la elekto de la viktimo. Ili sin prezentis ĉe la altaro, kiel ĉe batalo, sen tremo aŭ antaŭtimo. Post la kutimaj ceremonioj, preskaŭ tute samaj kiel tiuj, kiujn ni vidis antaŭe en Delfo, pastro de Minervo kunsuis la nomojn en la urno. Alproksimiĝis infano kun okuloj kovritaj per rubando. Lia mano jam estis ĉe la rando de la sankta vazo, tuj elironta kun mortokondamno, kiam subite virina voĉo sonis sur la sojlo de la templo:

”Haltu! Jen la viktimo!”

Tio estis Makaria, malrapide paŝanta al la altaro; Makaria pala kaj ornamita, balancanta sur sia frunto funebrajn rubandojn. Ajgistos ekkuris al ŝi: ”Vi tie ĉi, fratino! vi promesis, ke vi restos apud Iksos.”

”Iksos,” ŝi diris, haltigante plorspasmon, ”mortinta li estas! kaj nun nenio malpermesas, ke mi mortu por vi.”

Kaj ŝi daŭrigis sian paŝadon al la altaro.

La publiko aplaŭdis, la Heraklidoj submetiĝis. En tiu epoko oni imagis la manon de la dioj aganta en ĉiu eksterordinara okazo; oni do atribuis al iu inspiro tiel noblan sinoferon.

Tial Makaria genufleksis antaŭ la altaron sen malhelpo. Ŝi haltigis per gesto la rapideman glavon de la ofe-

risto, por ĵeti al la fratoj sian lastan rideton; kaj, fermante la okulojn, ŝi duone dismetis la vualon, kiu kovris ŝian bruston.

Du minutojn poste ŝia korpo trembatis sur la altaro.

Oni faris unu saman brulstakon por Iksos kaj Makaria. Kaj tiam, pro miraklo aŭ iluzio, kiu reokazis poste ĉe la morto de nia Johanino d'Arc, oni vidis, aŭ kredis vidi, ion, kio el la flamoj eliĝis al la nuboj kun dolĉa bruo de flugiloj.

Kio helpis la disvastiĝon de tiu kortuŝa tradicio? Sendube estas tio, ke post la venko de la Heraklidoj, venko tro kare pagita por resti longe atendigata de la dioj, la Mikenanoj, triumfe stariginte la statuon de Heraklo ĉe la bordo de la maroj, iun tagon trovis sur ĝi du alcionojn en la felo de la Nemea leono.

Tiel iam pasis tra antikva jarcento la du plej belaj belajoj en tiu ĉi mondo kaj ĉiuj jarcentoj: Poezio kaj Virto!

Hégésippe Moreau

(1810–1838)

El "Rakontoj al mia fratino"

El la franca tradukis René Lynagh

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-205-0